

中國新道

EL POPOLA

# ĈINIO





Herbo  
Foto de  
**LIU SIGONG**

## INTER NI

Mi deziras legi ĉion, kio temas pri kulturo, arto, sano, novaĵoj el E-movado. Mi ne deziras legi pri politiko, estraro en politika sfero, societaj problemoj, ĉar ĉi tiujn problemojn mi ĉiutage travivas kaj ili igas min nervoza kaj malsana.

**NEVENKA TOMIĆ** (Makedonio)

Mi deziras legi artikolojn pri virina agado, agado por paco tutmonde, sperto de ĉinaj medicinistoj, tradicioj kaj E-agado en Ĉinio.

**TAŜEVA MARIA** (Bulgario)

Estos bone, ke de tempo al tempo la redakcio de EPC organizos fotokonkurson, ekzemple pri feriaj vojaĝoj ktp.

**SLAWOMIR SZYMALA** (Pollando)

Mi kun plezuro ricevis la unuan volumon

de "Ruĝdoma Songo". Bonvolu transdoni miajn tutkorajn gratulojn al eminenta tradukisto kaj verkisto, estimata samideano s-ro Xie Yuming. Dankon por tiel bonega laboro. Kiom da horoj, kiom da jaroj da penado, serĉado kaj samtempe plezuro! Tiu traduko samtempe estas lia verko, la parto de li mem. La klarigoj estas ege utilaj, la prefaco helpas al pli profunda kompreno de tiu eksterordinara verko, kia estas "Ruĝdoma Songo", mi legas ĝin malrapide, por pli longtempe ĝui ĉiun vorton, ĉiun frazon. Laŭ mi, ĉiu esperantisto, kiu strebas al la perfekteco, devus atente tralegi ĝin.

**ZORKA ENIZAN** (Francio)

Tre plaĉas la serio, "Ĉinaj E-istoj", precipe la artikoloj pri Chen Demin kaj la Fuzhou-a E-lernejo.


**MAX WEARING** (Aŭstralio)

**ENHAVO**

- 2 *INTERNI*
- 4 Helpi geknabojn en ilia adoleskanteco
- 7 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*  
Geedzeco inter ĉinoj kaj alilandanoj
- 9 Distingiĝa Lijing-hotelo en Qingdao
- 10 *ESP-NOVAĴOJ*
- 11 *ĈINAJ E-ISTOJ:*  
Antaŭiranto de la Esp-movado de Liuzhou
- 14 *VOĈO DE E-ISTOJ:*  
Provaĵo pri poezio
- 16 *POR KOMENCANTOJ:*  
Frato kaj fratino
- 17 Kongreso perspektiva
- 21 *EN ĈINAJ URBETOJ:*  
En la urbeto de Maotai-vino
- 24 Neordinara familio
- 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*  
Sanduo-festo de naŝi-oj
- 28 Blonda virino adeptigita en Ĉinio
- 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*  
Por transiri la Flavan Riveron
- 36 Mia dektaga vojaĝo en Guangxi (I)
- 38 *SUR NIA LIBROBRETO:*  
Pri "222 Simplaj Versaĵoj por Komencantoj"
- 40 Ponto al resaniĝo
- 42 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 43 Festo de fiŝistoj
- 44 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*  
Por la sekureco de la popolo
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 *ĈINA KULTURO:*  
Naskiĝloko de antikvaj raketoj
- 50 *GALERIO:*  
Krono el oraj fadenoj
- SUR LA KOVRILO:*  
Ĉinaj mezlernejaninoj  
Foto de **Liu Sigong**
- 2 Herbo  
*SUR LA DORSKOVRILO:*  
Monto en nebulo

**LOKOJ MENCITAJ  
EN ĈI TIU NUMERO**

1. Dachuan (p. 24)
2. Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono (p. 36)
3. Guizhou-provinco (p. 21)
4. Wenxian-gubernio (p. 28)





Psikologia konsultiĝo

PANG NAIYING:

# Helpi geknabojn en ilia adoleskanteo

**P**OR la geknaboj mezlernejaj jaroj estas tempo, kiam ili akiras sciojn kaj kreskas korpe. Ĉi tie mi ne mencias ilian lernadon en leciono, sed sole tion, pri kio ili parolas post leciono. Mi infor-

miĝis de instruistoj, ke ilia interparolo temas ne nur pri popularaj kantoj, elstaraj piedpilkistoj kaj kosmoŝipoj, sed ankaŭ pri sekso.

La fakto, ke la liphara nigriĝo de la knaboj kaj korpoŝanĝiĝo de la knabinoj montras, ke ili

eniras en adoleskantecon. Tio pli-malpli maltrankviligas iliajn instruistojn. Iu mezlernejano ne kuraĝis eldomiĝi tage kaj movi sin surlite nokte pro veno de monataĵo. Ŝi diris: "Dameninde, terura tempo por mi!" Leginte erotikan novelon, iu knabo

ekhavis la deziron kisi knabinon kaj ne plu absorbiĝis en lernado. Kaj eĉ seksumo okazis inter iuj mezlernejanoj. Riproĉite de siaj gepatroj, ili falis en malĝojon kaj eĉ forlasis sian hejmon, opiniante sin nekomprenataj.

Kiel helpi ilin glate pasigi la adoleskantecon? Kuracisto Xu (Ŝju), kiu laboras en la mezlernejo Bayi de Pekino, diris al mi: "Por tio nia lernejo donas lecionon pri adoleskantecon al la lernantoj."

Klerigo pri adoleskantecon esence estas tiu pri sekso. Estas neimageble doni tian lecionon antaŭ jardekoj. Laŭ tradiciaj konceptoj de la ĉinoj estas granda tabuo paroli pri sekso. Tiam, se mezlernejanoj enamiĝis unu al alia, ili estis severe punitaj de la lernejo. Tamen, la neevitebla seksokonscio evidente karakterizas psikan trajton de la adoleskantecon. La instruistoj sentis, ke ju pli oni rigardas adoleskantecon mistera, des pli geknaboj faras stultajn, instigite de scivolemo pri sekso. Nun la mezlernejanoj vivas en tempo tute malsama ol la antaŭa. Sufiĉaj nutraĵoj frue maturigas ilin fizike kaj la familia dorloto plilongigas ilian naivecon psike, kaj plie, kun evoluado de la ĉina socio kaj la malferma politiko, la geknaboj facile akceptas diversajn informojn pri sekso, eĉ se iliaj lernejoj ne faras al ili klerigadon ĉi-rilate. Se oni ne donas al ili ĝustajn klarigojn pri fiziologia evoluado, do ili mem serĉas solvojn diversmaniere. Absorbiĝante en legado de erotikaj libroj kaj rigardado de aŭdvidaj bendoj pri amoro, ili tre malfacile elturnas sin el tio, kaj kelkfoje eĉ faras seksan krimon. Sekve, akcentante edukon de fizika sano kaj sinkrona disvolviĝo de moralo kaj intelekto oni devas preni sur sin ankaŭ la taskon doni al mezlernejanoj sciojn

pri adoleskantecon kaj konsultiĝon pri psika sano.

Antaŭ dek jaroj la mezlernejo Bayi komencis klerigadon pri adoleskantecon. Kuracisto Xu diris, ke nun la geknaboj ne plu timas pri sia fiziologia evoluado. Kiam knabinoj havas men-

nobla kaj konforma al la kategorioj de sociaj moraloj, alie okazos banala vulgareco." Por nobligi la animstaton de mezlernejanoj ĉiuj instruistoj serĉas taŭgan rimedon kunlabore kun la lerneja kuracisto. Mi informiĝis de instruistino He, ke foje



Leciono pri adoleskantecon

struon, ili ĉeestas fizikkulturan lecionon kiel kutime, ĉar ili bone scias, ke konvena sportado utilas al la sangocirkulado en la pelvo. Knaboj unuafoje spermatoreas, ĉar instruisto diris al ili, ke tio estas normala fenomeno de fiziologio.

Ofte okazas, ke junaj homoj ne povas kontraŭstari la seksan allogon kaj knabo intence stumbliĝas knabinon, kaj tiu "pugnas" lin ameme; foje knabo ĵetas krajonan gumon sur la kapon de knabino, dirante: "Mi amas vin". "Tio estas komprenebla," Xu analizis psikajn trajtojn de geknaboj en la adoleskantecon. "Kontakto inter homoj el malsama sekso devas esti civilizita,

laŭ ŝia aranĝo la geknaboj aŭskultis la prelegon "Amikeco kaj Amo" en la fonetika ĉambro. La geknaboj kun granda atento perceptis la profundan signifon de kontakto inter viroj kaj virinoj.

Ĉiuj geknaboj deziras sin beligi. Sed ili ne bone scias, kio estas vera beleco. Iuj knaboj havis longajn harojn, opiniante, ke ili simbolas belecon. Iu knabino ĉiutage iris al lernejo en altkalkanumaj ŝuoj kaj atinginte la lernejon, ŝi demetis ilin, ĉar estis malpermesate porti ilin en ĝi. Por ke la geknaboj sciu, kio estas vera beleco, la lernejo okazigis kurson de adoleskantececa beleco. Rezulte de tio, la knaboj tondis al si longajn harojn kaj la

knabino ne plu portis altkalkanumajn ŝuojn kaj komencis atenti la internan belecon.

Kelkiam naskiĝtaga festo estis alte taksata de mezlernejanoj. Ili multe elspezis por aĉeti donacojn kaj gastigi siajn amikojn kaj parencojn. En tiu tempo troa ekscitiĝo forgesigis al ili komprenadon al siaj gepatroj kaj diskretecon en kontakto kun knab(in)oj. Trovinte ĉion ĉi, la instruistoj proponis, ke la 13-a datreveno de ilia naskiĝo estu pasigata en la lernejo, ĉar tiam estas komenco de ilia adoleskanteco.

Tiutage, tiu, kiu pasigis 13-an datrevenon de sia naskiĝo, estis tre ĝoja. Sur la nigra tabulo pentriĝis granda kuko, ĉe kiu estis najlita sako kun bildoj plej ŝatataj de la infanoj, kaj enhavanta slipojn kun gratulaj vortoj de ties kunlernantoj.

La instruistino diris: "Gratulaj vortoj konsciigas, ke jam komenciĝis ilia juneco. Tamen i foje el tiuj gratulaj vortoj legiĝas nebula amo. Tiuokaze oni ne devas interveni, sed doni ĝustan gvidon."

Ĉiu mezlernejanano ricevis gratul-karton kun surskribo "Mi amas vin" en sia naskiĝtago, kiun faris la ĉefinstruistino. Ŝi diris, ke la geadoleskantoj bezonas pli plenan amon. Sen ĝi la homa animo estas sterila. Klerigado pri adoleskanteco estas nenio alia ol arto de amo sub formo de psika sugesto. Ekzemple, iu lernanto suferis de apendicito. Antaŭ operacio la instruisto kuraĝigis lin per la vortoj "Mi kredas, ke vi estas ĉiam forta". Kelkajn tagojn poste, lia patrino diris al la instruisto: "En la sekvanta tago post la operacio mia filo jam leviĝis!"

Iuj mezlernejananoj ŝtele enamiĝis unu al alia. Iu knabo demandis al sia instruisto: "In-

struisto, kiel vi opinias pri frua enamiĝo?" "Por tio necesas konkreta analizo. Ĝenerale, ni ne intervenas en tion." "Ĉu vi jam trovis mian enamiĝon?" La instruisto ekmiris. Poste, la instruisto ofte atentigis lin pro malsukceso de ties lernonotoj. Antaŭ faktoj li ĉesigis sian fruan amaferon.

Ne ĉiuj mezlernejananoj estas malkaŝemaj ĉi-flanke. Multaj fariĝas maltrankvilaj pro ŝanĝiĝo en fiziko kaj psiko, sed ili ne kuraĝas eldiri tion. Tial, ili ofte vizitas psikan konsultejon de la lernejo kaj kuracistoj, kiuj tenas sekreton por ili, fariĝis plej fidindaj por ili. Knabino, kiu volis sin mortigi, diris, ke ŝi enamiĝis al knabo, kaj ĉi tiu transdonis ŝian amleteron al sia instruisto... "Sen grundo semo ne burĝonas. Oni devas kaŝi la amon en la koro..." Kuracistino Xu konigis al ŝi amkoncepton de multaj eminentuloj kaj ties diligentan laboradon kaj lernadon post malsukceso en amafero. Dank' al tio, la knabino retrovis memfidon. Kuracistino Xu atentigis al la lernantoj, ke ili ne transdonu la ricevitan amleteron al instruisto, por ne damaĝi memrespekton de la skribinto.

"Pro kio vi malĝojas?" kura-

lernado. Fine, li verŝis la koron al ŝi: "Kiam mi legis la novelon, mi tutkorpe tremis. Poste, kion ajn mi faris, viglis en mia cerbo ĉiam erotika priskribo..." Kuracistino Xu instruis al li fari psikajn reordigojn por glatigi la animstaton. "Kredu, ke tio estas venkebla. En leciono vi konscie plifortigu stimuladon de korteksoj por lerni, dum ĉiuj aliaj partoj de la cerbo dronas en inhibiciado. Post leciono vi aŭskultu muzikon, faru ŝakludon aŭ kureturon por deturni stimuladon de la cerbo..." Laŭ ŝia propono ĉiuj lernantoj helpis lin kaj partoprenigis lin en postlecionaj aktivadoj. Nun la knabo pli kaj pli progresas en lernado.

La instruistoj de la mezlernejo Bayi opinias, ke edukado pri adoleskanteco faras ne nur lernejo, sed ankaŭ familio de lernantoj. Sana kreskado de lernantoj estas nedisigebla de la bona medio de lernejo, familio kaj socio. Tamen la rutina edukado far familio ne taŭgas por la nunaj infanoj, precipe por geknaboj en la adoleskanteco. Pro tio la lernejo regule funkciigas kurson por gepatroj. La kurso estas tre bonvena, ĉar en ĝi la gepatroj trovas pli sciencan kaj pli efikan rimedon instrui siajn geknabojn. ■



# Geedzeco inter ĉinoj kaj alilandanoj

de JI PING

*Ĉu ĉinaj fraŭlinoj rajtas edziniĝi al homoj alilandaj?*

JUKOVSKIJ IVAN (Rusio)

**L**A respondo al nia rusa leganto estas pozitiva. Ĉi-sube mi iom konigos al niaj legantoj la geedzecon inter ĉinoj kaj alilandanoj.

## GEEDZECO DEFENDATA DE LEĜO

Mi konfesas, ke oni havus malfacilojn por respondi tiun demandon, se nia leganto elmetus ĝin antaŭ 20 jaroj. Tiam kvankam la ĉinaj civitanoj rajtis laŭ "Geedziĝa Leĝo" ĝui la liberecon de geedziĝo, tamen la situacio estis komplika, alivorte, se iu ĉina fraŭlino enamiĝis al viro alilandano kaj volis edziniĝi al li, ŝi estis limigita de diversaj flankoj. Tiam Ĉinio praktikis pordferman politikon kaj fakte ĉinaj fraŭlinoj havis tre malmulte da ŝancoj enamiĝi al viroj alilandaj.

Nun la situacio multe ŝanĝiĝis. En aŭgusto 1983 la Ministerio de Civilaj Aferoj de Ĉinio ellaboris "Difinoj pri Registrado de Geedziĝo de Ĉinaj Civitanoj kun Alilandanoj". Ĝi defendas la leĝan rajton de koncernatoj. Dank' al tio la geedzeco inter ĉinoj kaj alilandanoj estas protektata de la leĝo.

Laŭ la difinoj ĉina civitano kaj alilandano loĝanta en Ĉinio longtempe aŭ portempe, inkl. de ĉino de alilanda ŝtataneco kaj alilanda enmigrinto, kiuj volonte geedziĝos en Ĉinio, devas peti registriĝon en la geedziĝa registrejo komisiita de la registaro de la provinco, municipo aŭ aŭtonoma regiono, kie loĝas la ĉina civitano. Por tio la ĉina civitano devas prezenti sian dom-kajeron kaj ateston donitan de la registaro almenaŭ de gubernia nivelo, kun ties familia nomo, persona nomo, indiko de sekso, naskiĝdato, nacieco, fraŭl(in)eco, eksedz(in)eco aŭ vidv(in)eco kaj profesio; la alilandano devas montri siajn pasporton, "Loĝpermeson de Alilandano" subskribitan kaj donitan de la ĉina polico, aŭ ateston por portempa restado en Ĉinio, kaj ateston pri fraŭl(in)eco, eksedz(in)eco aŭ vidv(in)eco donitan de la notaria oficejo de ties lando kaj konstatitan de la ambasadorejo aŭ konsulejo de Ĉinio en ties lando. Krome, ili ambaŭ devas prezenti atestojn de antaŭedziĝaj korporekzamenoj faritaj de la hospitalo komisiita de la geedziĝa registrejo.

## PLI KAJ PLI MULTAJ ĈINOJ KAJ ALILANDANOJ GEEDZIĜIS

Laŭ informo de la Ministerio de Civilaj Aferoj de Ĉinio, en la lastaj jaroj, ĉiujare pli ol 20 000 paroj da ĉinoj kaj alilandanoj registris sian geedziĝon en Ĉinio. El ili 15% estis personoj el Usono, Britio, Kanado, Japanio, Francio, Germanio kaj aliaj pli ol 30 landoj.

Antaŭ tiu cifero oni devas konfesi, ke amoro ne konas landlimon. Kiam Ĉinio malfermis sian pardonon, multaj alilandanoj venis en Ĉinion. Sekve de tio pli kaj pli da ĉinoj kaj alilandanoj geedziĝis. Tamen oni devas konfesi ankaŭ, ke iuj geedziĝis ne sole pro amo, sed ankaŭ pro aliaj kaŭzoj. Tiuj snoboj, kiuj sopiras pri fiksloĝiĝo en eksterlando, prenis geedziĝon kun alilandanoj kiel vojon facilan por ellandiĝo. Pro tio evidente multiĝis iatempe ĉinaj fraŭlinoj edziniĝintaj al alilandanoj.

## FELIĈO KAJ MALFELIĈO DE GEEDZIĜO INTER ĈINOJ KAJ ALILANDANOJ

En la somero de 1983 ĉina fraŭlino Chi Lianzi, kiu estis preta enskribiĝi por ĵurnalisma ek-

zameno por esplor-studentoj, ricevis ekster sia atendo leteron de iu nederlanda viro. Li skribis, ke de ŝia parenco li informiĝis pri ŝi kaj petas ŝian permeson abrupte saluti ŝin per letero. Poste ili reciprokadis leterojn kaj enamiĝis. Finfine ili geedziĝis.

Kiel Chi Lianzi, nemalmultaj ĉinoj edziĝis aŭ edziniĝis al alilandanoj pere de svatantoj. Nun Chi Lianzi kaj ŝia edzo havas du filojn. La geedzoj, kvankam kredantaj je malsamaj religioj, vivas harmonie kaj feliĉe.

Sed iuj aliaj haste edz(in)iĝis al alilandanoj pro momenta im-

pulso kaj poste vivas malfeliĉan vivon pro neatenditaj kaŭzoj.

Ĉina fraŭlino Yanhong edziniĝis al iu alilandano, nur kelkajn tagojn post sia konatiĝo kun li. Sed neatendite, ŝia maljuna edzo subite mortis pro kormal-sano nelonge post la geedziĝo. Kaj Yanhong fariĝis senhelpa en fremda lando.

Krome, iuj nigraj svatagentejoj kaŭzis tragediojn de geedziĝo inter ĉinoj kaj alilandanoj. En la lastaj jaroj, precipe en ĉemaraĵ sudorientaj regionoj iuj okupis sin pri svatado kaj, profitante de la deziro de iuj fraŭlinoj, postulis

de ili multe da mono sen konsidero pri iliaj interesoj. Trompите, multaj embarasiĝis. Nun koncernaj departementoj nuligas tiujn agentejojn.

De antikve la amo inter viro kaj virino estas sankta. Por kiu ajn, ĉu por ĉino ĉu por alilandano, la geedzeco, kiu bazas sin nur sur amo, estas feliĉa kaj solida. Ni esperas, ke pli da ĉinaj fraŭl(in)oj ĝuos tiun sanktan amon kaj feliĉan geedzecon, kvankam ili edz(in)iĝos al homoj de aliaj ŝtatanecoj kaj de aliaj haŭtkoloroj. ■

## '97-KONKURSO DE FOTOJ DE E-ISTOJ

Dank' al fervora subteno de niaj legantoj la rubriko "Fotaj Faritaj de E-istoj" pliriĉigis la enhavon de nia revuo. Ĉi tie ni kore dankas la kontribuantojn. Nemalmultaj legantoj interesiĝas pri la rubriko kaj esperas, ke ni ĝin daŭrigos, por ke e-istoj-fotoamatoroj faru interŝanĝojn. Pro tio ni okazigos en 1997 konkurson de fotaj faritaj de e-istoj kaj esperas, ke pli da e-istoj partoprenos en ĝi. Sendu al ni fotojn antaŭ la 31-a de aŭgusto 1997 (fotaj atingintaj post la dato partoprenos en la dua konkurso) kaj ili sinsekve aperos sub la rubriko "Fotaj Faritaj de E-istoj".

### I. Prijuĝado kaj premiado:

Niaj redaktoroj kaj ĉinaj fotistoj invititaj de la redakcio prijuĝos ĉiujn fotojn aperintajn sub la menciita rubriko kaj donos al plej bonaj el ili la unua-, dua- kaj triagradajn premiojn.

### II. Detaloj pri la konkurso:

Bonvenaj estas fotaj faritaj de e-istoj pri naturaj pejzaĝoj, vidindaĵoj, naciaj moroj kaj kutimoj. Bonvolu sendi al ni kolorajn fotojn

sur glacea papero kun grandeco almenaŭ de 126 x 86 mm aŭ kolorajn diapozitivojn, kaj koncizan klarigon por ĉiu foto. La nombro de la fotaj estas nelimitita. Skribu: por "Fotaj Faritaj de E-istoj", la nomon, adreson kaj landon de la aŭtoro preslitere.


### III. Premioj:

Ni aperigos la nomon de la premiitoj en la decembra numero de 1997. La premiitoj ricevos de la redakcio la revuon de EPĈ n-roj 1-12 de 1998 kaj Esperantan libron: "Ĉina Enciklopedieto" por la unuagrada premio, "5 000 Jaroj de Ĉinio" por la duagrada kaj "Provu por Via Sano" por la triagrada.

La rubriko "Fotaj Faritaj de E-istoj" servas al ĉiuj e-istoj. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al pli da legantoj. Laŭ la nombro de fotaj atingintaj la redakcion ni okazigos neregule tian konkurson, esperante, ke vi, niaj karaj legantoj, prezentos al ni proponojn kaj rimarkigojn por plibonigi la rubrikon.

**La Red.**





Lijing-hotelo

ZHANG QINGZHEN:

## Distingiĝa Lijing-hotelo en Qingdao

**Q**INGDAO de Shandong-provinco, situanta ĉe la Flava Maro, estas ĉarma turisma urbo. Ĝi ne estas fremda por esperantistoj, kiuj partoprenis la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto okazintan en la urbo. Ĝi ĉarmas ne nur per siaj belaj naturaj pejzaĝoj kaj komforta marborda medio, sed ankaŭ per sia ekzota arkitekturo. La nove funkcia Lijing(Liĝing)-hotelo altiras al si multe da turistoj per sia distingiĝa arkitekturo kaj fervora servo.

Maje ĉi-jare, mi venis al la nomita hotelo. S-ro Yang Xiaoming (Jang Ŝjaŭming), asistanto de ĝia ĉefdirektoro, akompanis min en rigardo de ĝiaj dek eŭropstilaj vidindaĵoj. En la fronto de la halo staras granda horloĝo el blanka marmoro, kun supra kaj malsupra scenejoj ĉe la mezo. S-ro Yang Xiaoming diris: "Ĉiufoje, kiam ĝi sonoras, la Neĝulino kaj sep pigmeoj gracie dancas. Kaj post unu horo la reĝa gvardio rondiras por fari inspekton." Ni eniris Lijinghalon. Ĝia plafono estas farita el duobla vakua vitro kun diametro de 26 m. En la sunlumoj ĝi ĉarme brilas. Sur la muroj de la halo pendas 12 grandiozaj 11a-jarcentaj ĝenropentraĵoj de Francio, faritaj el klozoneo. Fakuloj diris, ke la okcident-stilaj pentraĵoj, faritaj per originala ĉina metiarto, estas raraj majstraĵoj. Ankaŭ la aliaj ok vidindaĵoj, kiaj Longviva Globo, Maurya Imperio, 12 Konstelacioj, Dioj de la Suno kaj Luno kaj grandaj reliefoj, ĉiuj havas siajn proprajn trajtojn. Jen kial turistoj tie longe restas, ilin aprezante kun admiro. Tie okazis iuj solenaj aktivadoj de la urbo kaj provinco.

"Nia ĉefdirektoro Yang Wenhua dediĉis sian grandan energion al la konstruado de la hotelo," la asistanto diris. Li konigis, ke la 40-jara ĉefdirektoro servis en pluraj hoteloj kaj poste lernis en Usono kaj Japanio. Kiam iu konstru-grupo de Hongkong preparis sin por rekonstrui Lijing-hotelon per sia investo, ĝi prenis Yang Wenhua kiel taŭgan administranton de la afero. Novembre de 1993 li eklaboris kiel agento de la Hongkonga investanto.

Tiam la konstruado de Lijing jam daŭris ok jarojn, sed ĝi ne finiĝis. Pri la jam farita skeleto, s-ro Yang Wenhua kune kun specialistoj kaj teknikistoj faris refojan projektadon. En la konstruado oni aplikis

liajn multajn ideojn. Post 9-monata streĉa konstruado nova kvinstela hotelo aperis antaŭ la Qingdao-anoj.

5 monatojn post sia inaŭguriĝo Lijing ekprofitis. Samtempe preskaŭ ĉiuj aliaj hoteloj, en la unuaj du jaroj post sia inaŭguriĝo, senescepte malprofitis. Oni atribuis al Yang Wenhua la sukceson. Li organizis fortan gvidantaron el mez- kaj altnivelaj administrantoj dungitaj per alta pago el Pekino, Kantono, Hongkong k.a. Ĉiuj dungitoj ricevis profesian trejnadon. Ĉiuj gvidantoj inkl. de ĉefdirektoro devas doni lecionon. Ĉiuj laborantoj devas trapasi ĉiuf flankan ekzamenon kaj sin meti al prijuĝado en difinita tempo. Krome, li ellaboris detalan regularon por laboro.

Li tre zorgas pri la vivo de siaj subuloj. Li ofte kune kun ili ludas pilkon, kantas kaj babilas. Ĉiam, kiam iu el ili malsaniĝis, li vizitis lin kun fruktoj kaj floroj.

Yang Wenhua, estas laŭdata de ĉiuj laborantoj en la hotelo. Ĉiutage je duono post la sepa li eklaboras en la oficejo. Li laboras energie ĉiutage ĝis profunda nokto. En la hotelo oni rakontis al mi, ke en la fino de 1995 la direktoraro de Hongkong donis premion al ĉiuj laborantoj de la hotelo, escepte de Yang Wenhua, oni ne sciis, pro kio. Opiniante, ke Yang Wenhua devas esti la unua premiito, la laborantoj do kolektis monon kaj donis ĝin al li kiel premion. Sed Yang Wenhua transdonis la monon al la sindikato. Foje paro da geedzoj el Danlando venis al la hotelo, la edzino estis akuŝonta. Informiĝinte pri tio, Yang Wenhua tuj ordonis prepari beboĉambron kaj bebovestaron kaj ankaŭ freŝajn florojn kaj fruktojn. Kiam la bebo 3.4 kg peza estis naskita, oni nomis ĝin "Eta Lijing". Ĝi kiel speciala gasto ricevis unuarangan servadon.

Menciindas, ke la hotelo donas favorajn servojn por salajruloj de Qingdao. Ekz. en la manĝaĵa strato vendiĝas lokaj manĝaĵoj, bongustaj kaj malmultekostaj. Oni diris, ke ankaŭ nemalmultaj luksaj hoteloj sekvas ĝian ekzemplon.

La vojaĝo en Qingdao postlasis al mi malgrandan bedaŭron, ke mi ne vidis propraokule la elstaran entrepreniston Yang Wenhua, ĉar tiam li estis en Hongkong pro ofico. ■

## ESP-NOVAĴOJ

● En junio 1996 fondiĝis la Xiamen-a E-Asocio de Fujian (Fuĝjan)-provinco. Vicprofesoroj Lei Fan-yu kaj Huang Changqing (Hŭang Ĉangĉing) estis elektitaj kiel ĝiaj prezidanto kaj vicprezidanto. Pluraj ĵurnaloj de Xiamen raportis tion kaj la Xiamen-a Radiostacio elsendis la himnon "La Espero".



Trinidad Garcia (la unua de dekstre) kaj lokaj e-istoj

● Dank' al la invito de Trinidad Garcia, prezidantino de la E-Grupo Jozefo Anglès de Sant Cugat del Vallés, Hispanio, geedzoj Atistóphio Andrade kaj Núbia Alves instruis la internacian lingvon Esperanto en la Aŭtonoma Universitato en Sant Cugat del Vallés kaj en la E-Klubo de Rubi kaj Valldor-eix. (Salvador Aragaj)

● De la 26-a ĝis la 28-a de julio okazis la 6-a Korea Junulara Kongreso de Esperanto en la urbo Suwon, Koreio. La ĉi-jara kongreso havis tre specialan aspekton, ke la kongresejo estas la hejmo de s-ro Lee Gilsung, membro de la Korea E-Junularo (KEJ). Tio estas la unua fojo en la kongresa historio de KEJ. Sume aliĝis 49 personoj el la tuta lando. Intertempe okazis ankaŭ interkona vespero, fakaj kunsidoj, E-kurso por komencantoj, koreaj folkloraj ludoj kaj Takwondo (korea batalado), sportaj konkursoj ktp. La venonta kongreso okazos ne en 1997, sed en 1998, ĉar en la venonta jaro okazos en Koreio la 16-a Komuna Seminario de Esperanto inter la koreaj, ĉinaj kaj japanaj junuloj. (Kim Kiwon)


● La 2-an de majo 1996 d-ro Ulrich Lins vizitis denove E-Societon "Bude Borjan" en Zagrebo, Kroatio. Dum la duhora restado kun kroataj esperantistoj li aŭdis memorojn pri fama esperantisto d-ro Ivo Lapenna el Zagrebo, kiuj helpas al li verki la biografion de Ivo Lapenna.

Li havis okazon aŭdi pri la 3-a Mediteranea Internacia Renkontiĝo (MIRO). MIRO estis organizita de la Kroatia Esperanta Junulara Asocio (KEJA) inter la 29-a de marto kaj la 2-a de aprilo 1996 en pitoreska kroatia insulo Luŝinj. 80 esperantistoj el 14 landoj prelegis kaj amuziĝis pri la temo fabeloj kaj mitoj. La kunsido finiĝis kun bondeziroj por la venonta laboro kaj ankaŭ por la Studenta E-Klubo (SEK), Zagrebo, kiu festos 40 jarojn de sia ekzisto en 1997. (Ĵana Mir)

● En plenkolora, plej populara, ĉiutaga, plejvendata matena ĵurnalo en Teherano, Irano, "Hamŝahri (Samurbano)", n-ro 964, 06.05.96, p. 16, oni aperigis tre pozitivan artikolon pri Esperanto sub la titolo "Internacia Lingvo". Interalie oni skribis: "Laŭ lingvistoj la ekzisto de internacia lingvo por la novaĵoj de novaj agentejoj ne kontraŭas la progreson de naciaj lingvoj kaj ne malhelpas ilin. Ĝi faciligas nur la internaciajn rilatojn, kaj la popoloj de la mondo povus pli bone konatiĝi unu kun alia." (Ĵila Sedighi)

● Daŭrigante la E-disvastigadon en nia urbo kaj regiono je la 25-a de nov., 2-a, 9-a kaj 16-a de dec. 1995, Juscelino Gama, lia edzino Ariadne Davi kaj aliaj samideanoj ekspoziciis pri Esperanto en la Itala Domo, kiu estas la unua institucio, kaj oficialigis regulajn E-kursojn en la regiono. Je la 30-31-a de jan. 1996 ili duafoje ekspoziciis en la biblioteko de la Regiona Tribunalo pri Laborjustico. Je la 14-a de marto li ekinstruis pri la 2-a baza E-kurso en klasĉambro de la Matematika Instituto de UNICAMP-ŝtata universitato de Brazilo. 14 gelernantoj lernis ĝin. Tre menciinda ankaŭ estas, ke dum la tuta monato februaro la Itala Domo anoncis samtempe pri sia E-kurso kaj itala kurso pere de la fama regiona ĵurnalo "Correio Popular". S-ino Glaucia Leal, raportistino de la ĵurnalo, ekinteresiĝis pri Esperanto kaj finfine ekstudis ĝin ĉe la Unuiĝo de la Spiritaj Societoj. (Juscelino S. Gama)

Geedzoj Juscelino Gama kaj Ariadne Davi (la unua kaj dua de dekstre) kaj juĝistoj en E-ekspozicio





S-ro Lan Tianqiang

**E**N la centro de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono estas la 2 000-jara urbo Liuzhou (Liūgoŭ), kies Esp-movado havas historion de nur dekelkaj jaroj. Dum la dekelkaj jaroj pli ol 700 personoj lernis Esperanton. Iuj el ili fariĝis aktivuloj. Dank' al s-ro Lan Tianqiang (Lan Tjanĉjang) la movado en Liuzhou rapide evoluis.

En 1954 s-ro Lan naskiĝis en kamparana familio de Ĝuang-nacio en Xincheng (Ŝinĉeng)-gubernio de la regiono. La malriĉa vivo hardis lin. Kiam li estis 18-jara, li fariĝis laboristo en urbo. Poste li studis teknikon en trafika lernejo de la regiono. Post diplomiĝo li eklaboris en aŭto-riparejo de Liuzhou.

S-ro Lan ekkonis Esperanton pere de ĵurnala artikolo pri iu junulo, kiu memlernis nian lingvon. En 1979 s-ro Lan eklernis ĝin en koresponda kurso. Tiam Esperanto-movado ĵus revigliĝis en Ĉinio. Li kaj aliaj samkursanoj de Liuzhou starigis Esperantan grupon. Ili estis la unuaj e-istoj en la urbo.

En 1983 s-ro Lan instruis en teknika lernejo. Li havis pli multe da libertempo por studi Esperanton. Li studis en 3-monata kurso, kiu okazis en Nanning, ĉefurbo de la regiono. Post studado leviĝis lia lingvonivelo. Reveninte en Liuzhou, li aktive propagandis Esperanton, helpis komencantojn en lernado kaj preparis fondon de Esperanto-Asocio. Sub la sankcio de la Federacio de Soci-sciencaj Asocioj, en 1985 la Liuzhou-a Esperanto-Asocio fondiĝis, kun li kiel ĝenerala sekretario.

Post nelonge li eklaboris en tiu federacio. Li okazigis periodan Esperantan kurson kaj fondis "Heroldo pri E-movado" kun eldonkvanto de 2 000 ekzempleroj, kiu iam fariĝis influa Esperanta periodaĵo. Poste la asocio fondis la Liuzhou-an E-lernejon por diversaj kursoj kun lernantoj el diversaj provincoj.

Post reelektado s-ro Lan fariĝis prezidanto de la

## ĈINAJ E-ISTOJ

# Antaŭiranto de la Esp-movado de Liuzhou

de WANG HANPING

asocio. En la federacio li aktive antaŭenpuŝis la E-movadon. En 1988 la asocio fondis la Servan Centron de Internacia Informa Interŝanĝo kaj publikigis "Gazeto de Konsultiĝo pri Ĉinaj kaj Eksterlandaj Informoj", kiu ne nur finance helpis la asocion, sed ankaŭ multe diskonigis ĝin kaj Esperanton.


Dum la lastaj jaroj same kiel en aliaj lokoj, la Liuzhou-a E-movado ne estis tiel prospera. Vizaĝe al multe da malfaciloj s-ro Lan dediĉis pli multe da tempo kaj mono al Esperanto kaj kombinis Esperanto-propagandon kun sia laboro. Liuzhou riĉas je turismaj lokoj. Li mempage kompilis "Turismo de Liuzhou" en la ĉina lingvo kaj Esperanto. Por helpi lokajn e-istojn li kompilis "Esperanta Manlibro pri Ofte Uzataj Vortoj" kaj aliajn.


S-ro Lan aktive partoprenis en E-kongreso en kaj ekster Ĉinio kaj starigis amikajn rilatojn kun multe da e-istoj. Aŭguste de 1995 geamantoj el Hungario vizitis Liuzhou. S-ro Lan akompanis ilin en ĝuo de naciaj moroj kaj belaj pejzaĝoj, kio tre kontentigis ilin.

S-ro Lan havas feliĉan familion. La filino lernas en mezlernejo, la filo en elementa lernejo, la edzino laboras en aŭtotransporta kompanio. Antaŭ kelkaj jaroj la gepatroj venis por pasigi siajn lastajn jarojn en lia hejmo. Lia vivo ne estas riĉa. La mebloj estas malnovaj, sed la libroj sur la bretaro pli kaj pli multiga.

En februaro de tiu ĉi jaro li estis sendita en antaŭurban vilaĝon por helpi ĝiajn loĝantojn sin liberigi de malriĉeco. Li helpis ilin starigi entreprenon. Li finos sian laboron tie en marto venontjare. Pro tio li ne povis partopreni la Unuan Azian Kongreson de Esperanto en Ŝanhajo.

S-ro Lan planas okazigi venontjare simpozion pri Esperanto kaj turismo. ■






1. S-ro Lan Tianqiang (la unua de maldekstre en la antaŭa vico) en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto
2. S-ro Lan Tianqiang (la unua de maldekstre), liaj familianoj kaj alilandaj gesamideanoj
3. S-ro Lan Tianqiang (la dua de maldekstre) en kunsido de komitatoj de la Liuzhou-a E-Asocio
4. S-ro Lan Tianqiang (meze) kaj hungaraj gesamideanoj sur Laoshan-monto de Qingdao
5. S-ro Lan Tianqiang donas lecionon de Esperanto.

1	3
2	4
	5



# Provaĵo pri poezio

de R. CHEVALLIER\* (Francio)



La aŭtoro (maldekstre) kaj lia ĉina amiko en Changsha

Ĉiuj aŭ almenaŭ multaj personoj konas la faman sekvantan poemon fare de Verlaine kaj titolita

## Chanson d'automne (Kanzono de aŭtuno)

Les sanglots longs  
Des violons  
De l'automne  
Blessent mon cœur  
D'une langueur  
Monotone

Tout suffoquant  
Et blême quand  
Sonne l'heure  
Je me souviens  
Des jours anciens  
Et je pleure

Et je m'en vais  
Au vent mauvais  
Qui m'emporte  
Dedans, delà  
Pareil à la  
Feuille morte.

Ĉi tiun poemon tradukis tri konataj esperantistoj. Jen la tri tradukoj:

**Aŭtuna kanteto**  
(trad. M. Pagnier)

La longa plorado  
De la violonoj

**Aŭtuna kanto**  
(trad. Grabowski)

Dum ĝeme sona  
La violona

**Aŭtuna kanto**  
(trad. Kalocsay)

La velksezon'  
Per violon'

De l' aŭtuno  
Vundadas la koron  
Al mi per langvoro  
Unutona

Sufoke premata  
Kaj pala kiam  
Batas horo,  
Mi ree memoras  
La tagojn iamajn  
Kaj mi ploras.

Kaj mi foriradas  
En venton malbonan,  
Kiu pelas  
Ĉi tien kaj tien  
Min kiel folion  
Flave sekan.

Aŭtuna spir'  
Premiĝas koro  
De monotona  
Sopir'

Iĝante pala  
Ĉe la metala  
Horo-sonor'  
De l' rememoro,  
Iras kun ploro  
Mi for.

La vento blovas  
Kaj for min ŝovas,  
Kaj estas mi  
Kiel falinta  
Kaj flaviĝinta  
Foli'.

Ĝemo sona  
Vundas ĉe l' kor'  
Min per langvor'  
Monotona

Sufoke nun  
Kaj pale dum  
Tintoj horaj  
Memoras mi  
Kaj ploras pri  
Tagoj foraj.

Mi vagas, jen  
Zigzagas en  
Vento forta  
Kun svena fal'  
Simile al  
Branĉo morta.

En sia verko titolita "L' ESPERANTO" (Presses universitaires de France) troisième édition S-ro Pierre Janton publikigis ĉi tiujn tri poemojn kun la sekvanta rimarko: "La unua teksto (fare de Pagnier) estas unu rigora laŭvorta traduko de la poemo fare de Verlaine. La dua kaj tria verkoj de konataj poetoj serĉas precipe eldoni la belecon en la aparta registro de Esperanto."

Do kiam oni tradukas poemon oni povas:

ĉu fari laŭvortan tekston

ĉu komuniki la belecon (verŝajne la laŭvorta traduko ne kapablas tion laŭ Janton) sed la rimedo ne estas difinita en la verko de Janton.

Ŝajnas al mi, ke oni devas traduki poemon kun ĝia beleco per la aplikado de la sekvantaj principoj:

— uzi saman nombron de verseroj en la versoj,

— transdoni la ritmon de la originalaj versoj,

— uzi kiel eble plej similan specon de vortoj, t.e. fari laŭvortan tradukon, kondiĉe ke estus bone transdoni la ritmon, se ne, uzi aliajn vortojn pli taŭgajn rilate al la ritmo.

Nun oni povas taksu la aplikadon de ĉi tiuj principoj dum la traduko de la poemo.

Sed, antaŭe, oni devas ne forgesi, ke la versernombro estas aparte grava rilate al Verlaine, ĉar Verlaine mem verkis sian "Art poétique" (Arto poetiko), kiu komenciĝas tiel:

De la musique avant toute chose  
Et pour cela préfère l'impair  
Plus pur et plus soluble dans l'air

Muzik' antaŭ ĉiu aĵo  
Pro tio elektu nepara  
Pli pura, solvebl' en aero

Nun estas rimarkinde, ke la Kanzono de Aŭtuno, tiel muzika, havas parajn versojn.

La unua teksto ne estas tute ekzakta laŭvorta traduko, jam en la titolo. La vorto *chansonnette* (kanteto) ekzistas en la franca lingvo kaj Verlaine ne uzis ĝin; li elektis la vorton *chanson* (kanzono). Same la adjektivo *automnal* (aŭtuna) ekzistas, sed Verlaine preferis la esprimon: de l'*automne*.

La lasta verso laŭ Verlaine temas pri "mortinta folio"; Verlaine ne skribis (kiel li povis) "folion flave sekan"; ĉi tiu estas invento de la tradukisto.

La dua kaj tria tekstoj estas tute rimarkindaj, mirindaj, admirindaj, ĉar ili observas la rimojn laŭ la sama kompono elektita de Verlaine, per ne samaj rimoj kompreneble.

Sed la dua teksto konsistas el versoj kun variebla nombro de verseroj: ofte 5 kaj kelkfoje 2 aŭ 4.

La tria teksto estas pli valora, ĉar ĝi havas ĉiam 4 verserojn ekzakte kiel Verlaine mem elektis. Tamen ĝi ne sugestas bonan ideon de la kortuŝanta nostalgio eligita el la poemo. Ekzemple: la "branĉo morta" en la lasta verso ne similas la afliktintan rezignon de la "morta folio" fluganta laŭ la vento.

Jen mia traduko per aplikado de la principoj: egala nombro de verseroj, la plej egalaj simplaj vortoj, sen rimoj, kiam serĉi la rimon ĝenas la ritmon.

### Kanzono de aŭtuno (trad. R. Chevallier)

Longaj ploroj  
De violon'  
Dum aŭtuno  
Vundas koron  
Per langvoro  
Monotona.

Sufokante,  
Pale kiam  
Horo sonas  
Mi memoras  
Oldajn tagojn  
Kaj ekploras

Kaj iras kun  
Aĉa vento  
Portante min,  
Tie, dise,  
Same al la  
Mort' folio.

\*La aŭtoro naskiĝis en 1923 en Francio. Li laboris kiel konsil-inĝeniero en la inventa fako ĝis la fino de 1992. Li vizitis kvarfoje Ĉinion profesie kaj turisme. Post sia emeritiĝo en 1993 li eklernis Esperanton. Li loĝas en ĉirkaŭaĵo de Parizo.

# Frato kaj fratino

de MENG XIAODAN

**M**I havas 12-jaran filon kaj mia frato — 6-jaran filinon. Kvankam ili loĝas malproksime unu de la alia kaj povas renkontiĝi nur unu- aŭ dufoje ĉiujare, tamen la gefratoj, tre intimaj, ofte interparolis per telefono, almenaŭ 20 minutojn ĉiufoje. Kunestante, ili fariĝis nedisigeblaj kaj kune amuzis sin per diversaj ludoj. Antaŭ sia fratino mia filo kondukis vere kiel pliaĝa frato, tio rezultis el mia edukado al li en ĉiutage vivo — mi deziris, ke li fariĝu grandanima. Efektive li, rigardata de siaj samklasanoj kiel “grandanima sinjoro”, ne malesperigis min. Kiam lia juna fratino petis, ke li servu al ŝi kiel ĉevalo aŭ ke li portu ŝin surdorse, li ĉiam volonte tion faris kaj neniam plendis kontraŭ ŝi. Mi demandis lin, ĉu ŝi tedis lin. Li respondis kun veo: “Kion fari? Miaj kamaradinoj estas pli enuigaj ol ŝi.”

Foje dum vespermanĝo, vidinte, ke mia filo manĝis fungon kaj en la plado restis malmultaj fungoj, ŝi malĝojis. Kaj mia filo prenis ilin unu post alia por ŝerce inciti ŝin. Koleriĝinte, ŝi vangofrapis lin. Tio surprizis ĉiujn ĉeestantojn. Ankaŭ ŝi stupo-

riĝis pro sia faro. Ŝi konfesis sian kulpon, tuj karesis al li la vizaĝon kaj senĉese petis pardonon. Mia filo diris kun devigita rideto: “Ne gravas, mi nur ŝercis kun vi.” Je tio liaj okuloj ruĝiĝis. Poste ili ambaŭ ne plu manĝis, eniris en alian ĉambron por rakonti historiojn kaj baldaŭ aŭdiĝis iliaj gajaj ridoj.

Mia filo, bela kaj forta, estas tre aminda por sia fratino. Iutage mi aŭdis ilin babili. Ŝi diris: “Fracjo, mi edziniĝos al vi, kiam ni grandiĝos.” “Kion?” leviĝis la laŭta voĉo de mia filo pro surprizo. Malgraŭ ke li ĉiamaniere klarigis al ŝi, ke ili ne povos geedziĝi, ŝi komprenis nenion. Fine ŝi foriris kun vortoj “kiel ajn mi edziniĝos al vi” kaj ŝia frato restis ege maltrankvila. Mi eksplodis de rido pro ilia naiveco.

Ĉiufoje ŝi adiaŭis nin en frua mateno kaj mia filo neniam ellitiĝis por diri adiaŭon al ŝi. Malgraŭ ke ŝi ploris, li ŝajnis sin nevekiĝinta. Nur post aro da promesoj ŝi foriris kun bedaŭro.

Rigardante la gefratojn, oni povas facile imagi ilian solecon post la disiĝo. Kaj ili konis pli bone la valoron de sia sincera amo. ■





LU BINSHENG:

# Kongreso perspektiva

— Pri la 81-a UK en Prago



**K**IEL delegitoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de “El Polola Ĉinio” mi kaj aliaj tri ĉinaj samideanoj vojaĝis je la 20-a de julio al la mil-tura urbo Prago por ĉeesti tie la 81-an Universalan Kongreson de Esperanto kun prezidanto de la Ĉeĥa Respubliko s-ro Vaclav Havel kiel alta protektanto. Prago denove gastigis UK kun partopreno de 2 971 esperantistoj el 66 landoj, 75 jarojn post la 13-a tia kongreso en 1921.

Antaŭtagmeze de la sekva tago okazis la solena inaŭguro de la 81-a UK en la salono Zamenhof de la Kultura Centro. Je 10:20 UEA-prezidanto Lee Chong-Yeong martelis la inaŭguron. Poste salutis la inaŭguron LKK-prezidanto kaj ĈEA-prezidanto Vlastimil Kočvara kaj vicurbestro de Prago s-ro Dráback. Varmajn salutvortojn donis ankaŭ reprezentantoj el ĉ. 50 landoj. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ ambasadoroj de Lito-

vio, Slovenio, Ukrainio, Argentino, Koreio kaj Italio. Ĝenerala sekretario de UEA s-ro Mark Fettes voĉlegis “Manifeston de Prago”, kiu temas pri demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.

La kongreso ricevis multajn salutojn, inkluzive tiun adresitan de d-ro Luis Zamenhof-Zaleski, nepo de nia majstro.

Omaĝe al la centjariĝo de Esperanta teatraĵo, la bulgara teatra trupo prezentis en la solena malfermo fragmenton el la teatraĵo “La Unua Brandfaristo”, kiun verkis L. Tolstoj kaj kiu estis la unua Esperanta teatraĵo antaŭ 100 jaroj.

La inaŭguro finiĝis per la himno “La Espero”.

Dum la kongresa semajno la kongresa temo “Kulturo: ĉu valoro aŭ varo?” estis traktata en du alt-nivelaj prelegaroj fare de verkistoj kaj kulturantaj esperantistoj.

Kvankam oni donis malsamajn opiniojn, tamen plejparto venis al la konsento, ke kulturo devas esti varo altkvalita, en kiu komerceblo ne rajtas superi arton, kaj ke demokratio estas necesa, kvankam ne sufiĉa kondiĉo por alta kulturo.

Prof. d-ro Vlastimil Novobilský bone gvidis la Internacian Kongresan Universitaton (IKU), en kiu naŭ elstaraj samideanoj, inkluzive de Nobelpremiito prof. Reinhard Selten, faris prelegojn interesantajn kaj klerigantajn la vastan aŭskultantaron. Kaj la multeco kaj alta nivelo de la prelegoj estis maloftaj en IKU. Du el la prelegoj, nome pri estetiko de beletra verko de prof. Ignat Florian Nociort kaj ludoteorio de prof. Reinhard Selten, daŭris ankaŭ per kompletiga kurso de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Tia kunlaboro inter IKU kaj AIS okazis unuafoje.

Dum la kongresa semajno okazis ankaŭ Nitobe-simpozio de internaciaj organizoj pri lingvo kaj





Nitobe-simpozio



Junaj kongresanoj

Redaktoroj de EPC gastas ĉe sia ĉeĥa peranto Vladislav Hasala.





Prof. Lee Chong-Yeong ĉe EPC-giĉeto



S-ino Tan Xiuzhu akceptas bukedon de EPC-leganto.

Ĉinaj kongresanoj ĉe Esperanta monumento antaŭ la kongresejo



ĈI ĜU TIUO LESIS HANĜIA  
POR MEMORO PRI LA  
CENTJARA DATRIVENO DE  
ESPERANTO KAJ LA  
OKDEK-KVINA DATRIVENO DE  
LA ESPERANTISTA MOVADO EN  
PRAGA - SEP 1907


TATTO ĜDA  
BYLA ZASAZENA  
NA JANĜY 1900 VJE.  
VZROU ESPERANTA  
A 25 STYĜYCI ZAGREBU  
ALĜBU IFFERENTISTE  
- 4 PAZE

internaciaj paco kaj demokratio. Ĝin organizis UEA kaj partoprenis reprezentantoj de UN, Unesko, Eŭropa Parlamento, internaciaj neregistaraj organizoj kaj UEA. Ĝi estis aranĝita memore al la fama japana diplomato Inazo Nitobe, kiu ĉeestis la 13-an UK en 1921 en Prago kiel ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj. Poste li verkis tre pozitivan raporton pri Esperanto, en kiu li nomis nian internacian lingvon "motoro de internacia demokratio". En la postaj diskutoj en la Ligo de Nacioj li ĉiam estis fervora simpatianto de Esperanto. En la simpozio la reprezentantoj de internaciaj organizoj ekkonis la gravecon de Esperanto kaj faris diskutadon rilate al komunikado kaj lingva demokratio.

Kiel aziano, mi interesiĝis pri la Esperanto-movado en Azio. Posttagmeze de la 22-a de julio okazis publika kunsido pri azia agado kun partopreno de proksimume 40 samideanoj el 13 landoj. La raportoj kaj diskutoj en la kunsido reale reflektis la nunan situacion de la Esperanto-movado en aziaj landoj kaj pozitive rezultis por la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo, Ĉinio, de la 22-a ĝis la 25-a de aŭgusto.

Posttagmeze de la 23-a okazis en la salono Piĉ kunsido de legantoj kaj perantoj de "El Popola Ĉinio". Vicĉefredaktorino Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭĝu) rakontis al pli ol 150 ĉeestantoj la laboron kaj situacion de la redakcio en la pasinta unu jaro. Ŝi diris, ke "El Popola Ĉinio" alfrontas diversajn defiojn de la merkato-ekonomia sistemo kaj havas multajn problemojn en la nova situacio. La plej granda problemo por EPĈ estas manki al ĝi sufiĉe granda nombro da abonantoj, tial la daŭra ekzisto de EPĈ dependas ne nur de la redakcio, sed ankaŭ de la abono, abonigo, kunlaboro kaj helpo de niaj samideanoj. Ŝi dankis tiujn malavaraĵojn samideanojn, kiuj donacis monon al Fondaĵo EPĈ-abono kaj per tio ebligis al nepagipovaj legantoj aboni la revuon. S-ino Tatjana V. Auderskaja, leganto el Ukrainio, montris

paperajn eltondaĵojn faritajn de infanoj de Esperanta rondeto en la urbeto Razdelnaja, provinco Odesa. Ŝi diris, ke ili legis kelkajn artikolojn de EPĈ pri ĉinaj popolaj eltondaĵoj. Ankaŭ la ukraina popolo posedas tiun belan antikvan arton, sed en Ĉinio tiu tradicio estas pli antikva. Ŝi esperis interŝanĝi tradiciajn artaĵojn de la du popoloj por koni la teknologion de ilia farado. Ankaŭ aliaj legantoj donis tre bonajn opiniojn kaj utilajn suges-



Redaktoro de EPĈ kaj malgrandaj kongresanoj

tojn por pliriĉigi nian revuon. Tuj antaŭ la komenco de la kunsido s-inon Tan agrable surprizis freŝa buketo de nia leganto kiel donaco.

Matene de la 22-a de julio, tago de la libro, s-ino Tan konigis la nove eldonitan kaj lukse binditan ĉinan klasikan romanon "Ruĝdoma Songo" (Volumo I), esperantigitan de akademiano Xie Yuming (Ŝje Juming). La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj dramoj de Ŝekspiro en Britio. S-ino Tan diris, ke la Ĉina Esperanto-Eldonejo aperigos ĝiajn duan kaj trian volumojn respektive fine de 1996 kaj venontjare.

En la kongresejo ni havis ĝiceton por abonigo. Ni solvis la aktualan problemon de tiuj, kiuj ne povas pagi dolarojn. Tiel, multaj sin turnis al nia ĝiceto por aboni "El Popola Ĉinio" por unu, du aŭ eĉ tri jaroj. Ĉe la ĝiceto ni gaje babilis kaj faris fotadon kun niaj

abonantoj. La ĝiceto servis ankaŭ kiel ponto de amikeco inter ni kaj niaj abonantoj.

Je la 10-a horo antaŭtagmeze de la 27-a de julio okazis solena fermo de la 81-a UK, pri kiu oni faris detalan resumon.

S-ro Mark Fettes voĉlegis la Kongresan Rezolucion, ke *la 81-a UK konfirmas la urĝan bezonon de vasta tutmonda diskuto pri la lingvaj homrajtoj, la lingva egaleco, kaj la neceso de efika kaj altkvalita komunikado trans lingvajn barojn, emfazas, ke la Esperanto-komunumo jam atingis rimarkindajn sukcesojn sur tiuj terenoj, kiuj meritas seriozan esploradon de kompetentaj lingvopolitikaj instancoj kaj fakuloj, kaj invitas ĉiujn internaciajn organizaĵojn kaj lingvopolitikajn instancojn al kunlaboro kun la internacia Esperanto-movado por la konstruado de pli justa kaj demokratia lingva ordo.*

Ĉe la fino de la fermo aperis sur la podio pli ol 50 7-15-jaraj infanoj Esperante parolantaj el ĉ. 20 landoj, kiuj antaŭ kelkaj tagoj partoprenis internacian infanan kongreseton 50 km. sude de Prago. Ilia alveno tuj vigligis la etoson de la kongresejo.

Tagmeze s-ro Lee Chong-Yeong martelis la fermon de la 81-a UK.

En tiu momento mi dronis en medito: Kiel lingvo, Esperanto ankoraŭ estas juna, tamen inter ĝiaj parolantoj multaj estas jam maljunaj. Tion oni jam vidas. Sed ĉi-foje en la kongresejo montriĝis nemalmultaj junaj vizaĝoj, kio signifas, ke nia movado havos sendube fortan vivipovon kaj vastan perspektivon. Malgraŭ tio ni sentas urĝan bezonon klerigi kiel eble plej multajn gejunulojn, esperante ke ili daŭrigos nian aferon kaj klerigos en la estonteco siajn nepojn, por ke nia verda standardo flirtu eterne.

Mi pensis kaj pensis, kaj antaŭ miaj okuloj prezentigis kvazaŭ bildo de granda familio paca kaj harmonia. ■

# En la urbeto de Maotai-vino

Teksto de QIU HUANXING

Fotoj de WANG ENPU

**O**NI povas diri, ke ĉiuj ĉinoj kaj eĉ multaj alilandanoj scias pri Maotai-vino, sed malmultaj konas Maotai-urbeton, kie produktiĝas la vino. Ankaŭ por mi estis la unua fojo viziti tiun urbeton ĉirkaŭitan de montoj en Guizhou-provinco en la suda parto de Ĉinio. En vintra vespero mi atingis la urbeton. En milda vento la bonodoro de vino tiklis al mi la nazon kaj mi tuj rememoris la vortojn de prauloj, ke en Maotai-urbeto oni iom ebriiĝis kisite de vento por ne paroli pri trinkado de la vino.

Maotai-urbeto havas ĉ. 10 000 loĝantojn, kies triono okupas sin pri vinfarado. Laŭdire, 300 jarojn antaŭe ĝi estis malriĉa montvilaĝo. Preter la vilaĝo fluis Chishui-rivero, sur kiu veturadis boatoj. Kaj komercistoj venadis en la vilaĝon. Eĉ hodiaŭ multaj komercistoj loĝas ankoraŭ en la domoj sur fostoj ĉe la rivero. Tradicie, ĉiun tagmezon kamparanoj loĝantaj trans la rivero alveturigis sian malgrandan pramon plenan de legomoj, kaj montanoj, vektorportantaj mandarinon, terpomojn, sukerkanojn, lignon kaj aliajn montregionajn produktaĵojn, alvenis de malproksime laŭ zigzagaj montvojoj. Tiam la urbeto fariĝis movoplana.

La torenta Chishui-rivero alportis al la urbeto ne nur la floradon de komerco per sia oportuna navigacio, sed ankaŭ la prosperon de vinfarado per sia bonkvalita akvo. Ĝuste el pli ol 30 vinfarejoj grandaj kaj malgrandaj en la urbeto disportiĝis agrabla odoro de vino.


Dank' al la aparta vinprodukta tekniko kun 8-foja fermentado, 7-foja bolado kaj 3-jara konservado, Maotai-vino havas originalan odoron. Eĉ iomete da malatentemo povas fuŝi la vinon. Pro tio naskiĝis en vinfarejo diversaj rilataj moroj, ekz., estas malpermesite al virinoj porti pladon en vinfarejon, por ke la vino evitu la odoron de la plado; estas tabua la vorto "acida", por ke la vino ne fariĝu vinagro; kiam la vino estas finfarita, oni kultas la Dion de Vino per bongustaj manĝaĵoj, brulantaj incensoj kaj kandeloj. Ĉe la Printempa Festo la mastro de la vinfarejo regalis siajn laboristojn per bankedo, teatraĵoj kaj aliaj amuzaĵoj dum kelkaj tagoj.

En la urbeto cirkulas ankaŭ interesa legendo pri la Dio de Vino. La legendo rakontas, ke antaŭ 3 000 jaroj iu viro, kiu mastrumis kuirejon kaj provizejon, estis punita pro putriĝo de greno konservata en kaverno. Poste la de li bredata kapro perdis la konscion post trinkado de likvaĵo elfluinta el la kaverno. Tamen ĝi rekonsciiĝis, kiam li volis buĉi ĝin. Do, ankaŭ li gustumis la likvaĵon kaj trovis, ke ĝi estas dolĉa. Post plurfoja esplorado kaj praktikado li kreis vinfaran metodon kaj estis rigardata kiel la Dio de Vino. Fakte, en Ĉinio la apero de vino estas multe pli frua ol tio. Ĉinaj arkeologoj eltrovis diversajn instrumentojn por vinfarado kaj vintrinkado en la ruino de Longshan-kulturo ekzistanta antaŭ 4 000 jaroj. Kelkajn jarojn antaŭe, oni elfosis du kruĉojn da vino el antikva tombo de antaŭ pli ol 2 000 jaroj. Kiam oni malfermis la kruĉojn, oni tuj elflaris la bonodoron de la vino.

En la hejmo de iu 72-jara vinfaristo mi gustumis Maotai-vinon. Tiuvespere la mastro sidigis min en la salono, apud la forno, kies granda ronda plato servas vintre kiel manĝotablo. Tenante vintason, la maljunulo diris al mi: "Vi estas nia gasto veninta de malproksime, bonvolu trinki vinon por vin revarmigi." Kutime, alilokaj ĉinoj regalis sian gaston unue per cigaredo kaj teo, dum Maotai-anoj per du tasoj da vino, ĉar en ĉiuj familioj de la urbeto konserviĝas vino.

En la urbeto cirkulas popoldiro "neniu donaco valoras pli ol vino". Kiam oni reciprokas dotojn aŭ fianĉdonacojn, tiu, kiu marŝas la unua, dumane tenas lignan pleton kun du boteloj da Maotai-vino; en la geedziĝa vespero la novgeedzoj devas kune trinki vinon brako en brako. Post tri tagoj la novedzino devas viziti siajn gepatrojn, akompanate de la novedzo, kiu nepre donacas al sia bopatro du botelojn da Maotai-vino. La novgeedzoj rekompencas la svatanton ĝenerale per botelo da vino. En aprilo Maotai-anoj kuiras rizon kun vino por kulti la mortintajn parencojn. En majo okazas konkurso de drakboatoj sur proksima rivero. Oni kuraĝigas la konkursantojn ĉiam per grandaj bovloj da vino. Kiam la konkursantoj surbordiĝas tre lacaj post la konkurso, ĉu venkinte ĉu venkinte, oni prezentas al ili po unu tason da Maotai-vino.

En la urbeto staras butikoj unu tuj apud alia, kiuj provizas montanojn per vino. Eĉ en tre malgranda butiko estas loko destinita por forno kaj kelkaj benkoj ĉirkaŭ ĝi. Kiam montanoj, tre lacaj kaj malsataj, elvendinte siajn montregionajn produktaĵojn, du- aŭ triope vizitis la butikon, ĝia mastro liveris al ili vinon kaj frititajn arakidajn grajnoj. Sidante ĉirkaŭ la forno, ili trinkis kaj manĝis kaj poste aĉetis por siaj edzino kaj infanoj sapojn, bombonojn, ŝuojn, ŝtrumpojn k.a. Kiam ili adiaŭis la butikon, aŭdiĝis de la rivero laŭtaj, tirataj krioj de haŭlistoj...



Urbeto Maotai


Vendistoj de vinvazoj





Plektado de korbo por vinvazo

Farado de vinva-  
zoj



En pakejo de Maotai-farejo



# Neordinara familio



**E**N malsanula ĉambro de iu hospitalo 12 geknaboj kun freŝaj floroj en la manoj ĉirkaŭis malsanulan liton kaj konkure diris: “Panjo, ĉu vi iom resaniĝis?” Viŝante al si la larmojn, juna knabino plorĝemis: “Panjo, hejmen revenu frue, mi volas manĝi pladojn, kiujn vi preparos.”

Kiu estas la malsanulino kusaŝanta sur la lito? Ĉu ĉiuj tiuj 12 geknaboj malsimilaj en aspekto estas ŝiaj gefiloj?

Ŝi nomiĝas Zou Chaobi kaj laboras en privata orfejo kiel ĝia estrino. La 12 geknaboj estas orfoj.

La sceno en la malsanula ĉambro kaj la vokoj “panjo” profunde kortuŝis min. Mi decidis viziti la orfejon funkciigatan de s-ino Zou.

La regiono Dachuan de

Sichuan-provinco estas sufiĉe malriĉa kaj la loĝantoj plejparte loĝas en malnovaj domoj, inter kiuj okulfrapas la blanka duetaĝa orfejo kun pura korto plena de fruktarboj. En la korto estas baseno kun malgranda ponto super ĝi, interkomunikiganta tri elegantajn kioskojn, kaj bela florbedo apud ili.

Akompanate de s-ro Wei, edzo de s-ino Zou, mi venis en la loĝejon de la geknaboj en la dua etaĝo. Ĉiu dormoĉambro estas granda kun tualetejo, vestoŝranko kaj tri paralele metitaj litoj. La litaĵoj estas bone ordigitaj kaj sub la litoj bonorde viciĝas ŝuoj. Ĉie en la ĉambroj regas pureco kaj bona ordo. Iu knabo diris al mi, ke la ĉambroj estas ordigitaj de ili mem.

En la unua etaĝo estas amuzejo, legoĉambro kaj manĝejo. En la amuzejo estas televidilo kaj elek-

tra ludilo. Min ege interesis la pentraĵoj kaj belskribaĵoj pendantaj sur muroj. S-ro Wei konigis al mi, ke la geknaboj regule okazigas konkursojn de pentraĵoj, belskribaĵoj, ĉina ŝako, kantado ktp. La elstaraj el ili estas premiitaj. La pasintan konkurson de ĉina ŝako partoprenis ankaŭ s-ro Wei, kaj fine lin venkis la plej aĝa knabo.

En la legoĉambro pliaĝaj geknaboj estis farantaj siajn postlecionajn taskojn. S-ro Wei diris al mi kun fiero: “Nun, 6 el la 12 geknaboj lernas en elementa lernejo kaj la aliaj 6 — en mezlernejo. Ili ĉiuj estas diligentaj kaj elstaraj en lernado. 4 el ili okupas la unuan lokon en la lernado.”

La orfejo kun 12 geknaboj estas negranda. Sed por ĝin funkciigi s-ino Zou pene laboris. S-ro Wei rakontis al mi, ke en la lasta tago de 1991 s-ino Zou renkontis survoje knabon almozpasantan. Do-



nacinte al li 30 juanojn, ŝi hejmen revenis. Tamen vespere, kiam la tuta familio ĝoje kolektiĝis kaj atendis la sonoradon por la Nova Jaro, ŝiajn pensojn ankoraŭ okupis la almozetanta knabo.

Maltrankvila pri li, ŝi serĉis lin en la sekvanta tago kaj trovis lin surstrate. Sed ekster ŝia atendo, la knabo ekploris, kiam ŝi volis konduki lin al lia hejmo. Li diris al ŝi, ke liaj gepatroj mortis kaj li ne havas plu hejmon. Tiel, s-ino Zou, kun larmoj en la okuloj, kondukis lin en sian hejmon. Je tio naskiĝis en ŝi ideo starigi orfejon kaj vivteni pli da orfoj por la socio.

En Ĉinio la orfoj estas vivtenataj ĝenerale de siaj parencoj kaj ricevas de la servolokoj, kie laboris la gepatroj, sumon da mono por vivtena kosto aŭ vivas en filantropiaj institucioj administrataj de la ŝtato. Kompreneble malmultaj orfoj vagabondas surstrate pro diversaj kaŭzoj. Por ili funkcias en Ĉinio specialaj organizoj, kiuj kondukas ilin al la hejmo aŭ al orfejo. Por iuj ĉinoj vivteni unu orfon ne estas malofta fenomeno. Tamen s-ino Zou funkciigas orfejon per sia propra mono kaj vivtenas 12 geknabojn, tio estas senprecedenca.

Kvankam ŝi sciis, ke la starigo de orfejo estas malfacila afero, tamen ŝi decidis fari tion. Por ŝin subteni, ŝiaj edzo kaj filino sinsekve ekŝiĝis kaj eklaboris en la orfejo. Dank' al la subteno de la loka registaro, la orfejo kun la totala areo de 2 000 kvadrataj metroj finkonstruiĝis post 6 monatoj. Ĝi portas la nomon Orfejo Haida. Poste oni dungis ankaŭ kuiristojn, vartistojn kaj instruistojn.

La 20-an de septembro 1994 la Orfejo Haida unuafoje akceptis 12 orfojn rekomenditajn de la loka departemento de civilaj aferoj. La plej aĝa el ili estis 14-jara kaj la plej juna – nur 5-jara. Ĉi tiu estas knabino nomata Zheng Jian. Kun pala mieno, malfortaj gamboj, velkaj kaj flavaj haroj, ŝi aspektis nur 3-jara. Kiaj ajn ili estis,

s-ino Zou prenis ilin kiel siajn proprajn gefilojn kaj al ili verŝis sian tutan amon. Por ke la 5-jara knabino sane kresku, s-ino Zou faris ĉion eblan: ofte aĉeti al ŝi tonikaĵon kaj dormi kune kun ŝi nokte. 2 monatojn poste, tiu febla knabino fortiĝis kaj povis marŝi kiel infano de normala kresko.

Zhou Yufang, unu el la 12 orfoj, pasigis sian infanecon en la familio sen amo. Ŝi estis silentema kaj singardema. Al ŝi s-ino Zou donis apartan prizorgon. En libera tempo ŝi ofte rakontis historiojn al

knaboj. Por garantii la kason de la orfejo, ŝi devas kontinue administri sian restoracion tage kaj vespere zorgi pri la manĝado kaj vestado de la geknaboj. Aŭtune de 1994 ŝi mem trikis puloverojn por la 12 geknaboj, kiuj, kvankam junaj, bone sciis, ke panjo trikis ankaŭ sian amon en la vestojn.

Por s-ino Zou estas ĝojinde, ke tiuj 12 geknaboj kun malsamaj karakteroj kaj temperamentoj povas kune vivi en harmonio kaj helpi unu alian. En la lernejoj ili estas laŭdataj kiel lernantoj kun



Konkurso de ŝakludo en la orfejo

ŝi, manĝis kaj ludis kune kun ŝi. Dank' al tio Yufang revigliĝis iom post iom kaj sur ŝia vizaĝo radiis rido.

Iun tagon la 12 geknaboj aperis antaŭ s-ino Zou kaj diris al ŝi serioze: "Onjo Zou, vi estas tiel afabla al ni! Lasu nin nomi vin panjo!" Dirinte tion, la 12 geknaboj sin ĵetis al ŝi kaj elkore vokis ŝin per nomo panjo.

Granda patrina amo baziĝas sur sindonemo. S-ino Zou ne malesperigas la sincerecon de la ge-

bona familia edukado.

Al tiuj geknaboj atenton donas ankaŭ diversrondaj personoj de Dachuan. En festaj tagoj la loka registaro certe sendas donacojn al ili. La eduka departemento decidis, ke ili vizitu lernejon sen pagi la lernokotizon. Ofte studentoj donis al ili helpon en iliaj postlecionaj horoj, kuracistoj ekzamenis al ili la korpon kaj razisto senpage tondis al ili la harojn. Oni etendis varmajn manojn al tiuj geknaboj. ■



# *Sanduo-festo de naŝi-oj*

Fotoj de CHE WENLONG kaj YANG SHIDUO



En la 8-a de la dua monato laŭ la ĉina luna kalendaro la naŝi-oj, kiuj loĝas ĉe Jinsha(Ĝinŝa)-rivero en sudokcidenta Ĉinio, festas Sanduo-feston. Legendo diras, ke en la antikveco vivis brava kaj justama viro Sanduo. En blankaj vestoj kaj kiraso kaj kun blanka lanco en la mano li rajdis sur blanka ĉevalo kaj batalis por forigi danĝeron por la popolo. Pro tio la naŝi-oj rigardas lin kiel sian propran dion. Ĉiujare en tiu tago ili kultas lin, kaj la festo portas ankaŭ la nomon "Festo de Oka de Dua Monato".

Frumatene de tiu tago kolektiĝas sur antaŭdifinita tereno naŝi-oj, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, kunportante manĝaĵon el glueca rizo, vinon kaj viandon kaj ankaŭ virkokojn destinitajn por la kultado. Dum la kultado okazas ĉevalvetkuro, flor-apreco kaj pikniko kun viando kiel la ĉefa manĝaĵo. Laŭ la tradicia kutimo, poste la manĝo oni kantas popolkanton unue, kaj poste gejunuloj dancas antikvan nacian dancon. Kaj ilin sekvas aliaj partoprenantoj. La kantado kaj dancado daŭras ĝis sunsubiro.





1. En Sanduo-festo
2. Antikva nacia danco
3. Preparado de festa manĝaĵo el glueca rizo
4. Survoje al festa aktivado
5. Pikniko



# Blonda virino adeptigita en Ĉinio

**T**IU usona virino kun bluaj okuloj kaj mallongaj blondaj haroj nomiĝas ĉinlingve Ora Suno. Ŝi fieras, ke ŝi ne nur bele parolas en la ĉina lingvo, sed ankaŭ lerte ludas *tajĝiĉĵuan* (tradicia ĉina bokarto).

En Ĉinio estas multaj skoloj de *tajĝiĉĵuan*, el kiuj Chen kaj Yang havas la plej vastan influon. Eĉ



Majstro Chen kaj lia alilanda disĉiplino

inter ĉinoj nur tre malmultaj povas fariĝi iliaj adeptoj. Tamen Ora Suno fariĝis disĉiplo de majstro Chen Qingzhou (Ĉen Ĉingĝoŭ), adepto de Chen-skolo.

Antaŭ 7-8 jaroj Ora Suno unuafoje lernis ĉinan luktarton en iu amatora *uŝu*-lernejo de Usono. En iu internacia *uŝu*-konkurso la prezentado de ĉina *tajĝiĉĵuan* profunde impresis ŝin. Kaj tiam naskiĝis en ŝi ideo vojaĝi al Ĉinio por lerni *tajĝiĉĵuan*.

Fruprintempe de 1991 Ora Suno venis en Ĉinion. Ŝi instruis en alternejo kaj samtempe lernis *tajĝiĉĵuan* post laborado. Kiam ŝi plenumis sian unujaran instruan kontrakton, iu *tajĝiĉĵuan*-instruisto diris al ŝi, ke por perfektigi en *tajĝiĉĵuan* oni devas lerni en Wenxian (Ŭenŝjan)-gubernio de Henan-provinco, la lulilo de *tajĝiĉĵuan*. Tie loĝas majstro Chen Qingzhou. Se oni ricevos liajn instruojn, oni certe multe progresos.

Tiu informo ege ĝojigis Oran Sunon. Post du-taga veturado per trajno kaj aŭtobuso ŝi atingis Wenxian (Ŭenŝjan)-gubernion. Du tagojn poste, ŝi renkontiĝis kun la afabla pli-ol-60-jara majstro Chen. Ŝi rakontis al li pri sia *tajĝiĉĵuan*-lernado en Ĉinio. Ŝi insiste petis lin, ke li akceptu ŝin kiel sian disĉiplon. Kortuŝite de ŝia sincereco, li serioze diris al ŝi: "Se vi havas firman volon, mi akceptos vin kiel mian disĉiplon kondiĉe, ke vi amas *tajĝiĉĵuan*."

Tie la vintro estis frosta. Ĉiutage frumatene majstro Chen biciklis de sia vilaĝo al la gubernia urbo por instrui Oran Sunon. Li estis rigora al ŝi pri ĉiu movo. Ofte ŝi devis sin ekzerci plurajn fojojn por unu movo. Antaŭ la Printempa Festo de tiu jaro preskaŭ ĉiuj gastoj hejmen revenis kaj oni ĉesis hejti la hotelon. Ora Suno volis plori pro malvarmo kaj soleco. En tiu momento majstro Chen gastigis ŝin en sia hejmo. En eksplodado de petardoj Ora Suno gaje pasigis tiun tradician ĉinan feston.

Dank' al la instruado kaj prizorgado de majstro Chen, Ora Suno progresis rapide. En la internacia jarkunveno de *tajĝiĉĵuan*, kiun partoprenis dekmi-loj da personoj, Ora Suno lerte prezentis *tajĝiĉĵuan* de Chen-skolo kaj vekis aplaŭdadon de la rigardantoj.

En la 10-a de septembro 1994 majstro Chen oficiale adeptigis Oran Sunon. En la solena ceremonio ŝi genue salutis sian majstron kaj lian edzinon kaj ĵuris al la ĉielo, tenante la adeptigan karton per ambaŭ manoj. Ŝiajn okulojn inundis larmoj, kaj ŝi ne plu povis daŭrigi la legadon pro emocio. Neniam ŝi atendis, ke tiu ĉina maljunulo senrezerve inicis ŝin, alilandaninon, kaj prizorgis ŝin kiel sian filinon.

Ora Suno diris al siaj amikoj: "Mi venis en Ĉinion pro sopiro al la ĉina luktarto. Tamen tie mi trovis, ke en Ĉinio estas ne nur luktarto tre fama en la mondo, sed ankaŭ longa historio, brila kulturo, originalaj moroj, ĉarmaj pejzaĝoj kaj laborema popolo. Ĉio tio donis al mi belan impreson. La ĉina luktarto multe plaĉas al mi kaj mi pli ŝatas studi la ĉinajn historion kaj kulturon. Fari kontribuon por akceli la amikecon kaj interkomprenon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj estas la plej granda plezuro por mia tuta vivo." ■

# Por transiri la Flavan Riveron

Teksto de BING CHUAN

Fotoj de HAN HONG

**K**OLEKTINTE akvon el malgrandaj fluoj sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, la Flava Rivero fariĝis sufiĉe larĝa antaŭ la Silka Vojo.

En la antikveco, kiam komercistoj venkis ĉiujn malfacilojn kaj atingis la Flavan Riveron, ili certe stuporiĝis de la vidaĵo antaŭ la okuloj. La Flava Rivero kun akvo brue plaŭdanta kontraŭ la bordaj krutaĵoj baris la vojon al la vojaĝantoj.

## ANTIKVAJ PRAMEJOJ ĈE LA RIVERO

Por transiri la riveron oni konstruis sennombrajn pramejojn ĉe la Flava Rivero en la antikveco. Multaj turistoj, interesataj de la Silka Vojo, kun granda scivolemo serĉis ilin. Estas noto, ke en Gansu-provinco estis la pramejoj Jinchengjin (Ĝinĉengĝin), Jincheng (Ĝinĉeng), Linjin (Linĝin) k.a. Tamen, ĉiuj antikvaj pramejoj malaperis en la historio.


Jam en la Okcidenta Handinastio (206 a.K. — 25 p.K.) ekfunkciis la pramejo Jincheng. En 81 a.K. la kortego de la dinas-


tio starigis la prefektujon Jincheng en la nuna Xigu(Ŝjigu)-distrikto de Lanzhou kaj la pramejo troviĝis ĉe la bordo de la Flava Rivero. En 50 a.K. ĉ. dekmilo da militistoj-rajdistoj de la dinastio transiris la riveron tie. Nun la pramejo estas anstataŭigita per pontoj ŝoseaj kaj fervojaj super la rivero.

Jinchengjin situis proksime de


la nuna Fervoja Ponto super la Flava Rivero en Lanzhou. Jam antaŭ 1 400 jaroj tie troviĝis pramejo. La prefektujo eknomiĝis Lanzhou en la 7-a jc. kaj sekve de tio, la pramejo Jinchengjin fariĝis aparte grava por iri al la okcident-aziaj landoj de la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero. Multaj gravaj diplomatoj, bonzoj, komercistoj kaj turis-

## SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







La zigzaga Flava Rivero  
Foto de **LIU WENMIN**



Kluzpordo malfermita  
Foto de **REN SHIYIN**




Generatoraro de Liujixia-hidroelektrejo



Transformara substacio kun kapacito de 720 kilovattoj  
Foto de **REN SHIYIN**

Inversaj sifonoj ĉe la Flava Rivero





La fera ponto Zhongshan

toj kaj regantoj de la okcidentaziaj landoj transiris la riveron per la pramejo por iri al la ĉefurbo de Ĉinio aŭ al la okcidentaziaj landoj. Antaŭ la finkonstruigo de la Fervoja Ponto super la Flava Rivero ĝi estis grava pramejo ĉe la Silka Vojo.

En Gansu-provinco estis alia fama pramejo Linjin. Ĝi estis superakvita en 1969 pro ekfunkciado de akvokonservejoj. Nun tie videblas la sola malgranda monto ĉe la antikva pramejo.

## PONTOJ SUPER LA FLAVA RIVERO

En longa tempo oni transiris la riveron ĉefe per lignaj boatoj kaj ŝafledaj flosoj. Nur en la mezo de la 12-a jc. konstruiĝis la plej frua flosponto super la rivero proksime de Jinchengjin, t.e. la ponto Zhenyuan (Ĝenjŭan). Oni starigis 4 gigantajn ferajn fostojn ambaŭborde de la rivero, al kiuj ligiĝis 6 dikaj kabloj, ĉiu 400 m longa, paralele enakvigis 24 ŝipojn kunligitajn per ŝnurego kaj fiksis ilin al la kabloj. Sur la ŝipoj oni sternis tabulojn. La flosponto estis malkonstruita ĉiujare antaŭ la inunda sezono kaj rivera glaciigo. Rezulte de tio, oni povis uzi la ponton nur kelkajn monatojn ĉiujare. Tamen tia ponto

funkciis 530 jarojn.

Super la Flava Rivero aperis fera ponto en la komenco de la 18-a jc. Tiam la registaro de Qing-dinastio asignis 366 milojn da taleoj da arĝento kaj konstruigis en pli ol 3 jaroj feran ponton en la loko de la antikva ponto Zhenyuan. La fera ponto

longis 250 m kaj larĝis 8 m. Kun planko el dikaj feraj platoj ĝi estas 5-spana kaj 4-piliera kaj povas elteni ŝarĝon de 8 tunoj. Oni nomas ĝin la Unua Ponto super la Flava Rivero.

En la 50-aj jaroj oni faris riparadon al la ponto, pliiĝis ĝiajn arkajn ŝtalajn subtenilojn kaj asfaltis ĝin. Poste, la magistrato konstruigis ŝosean ponton proksime de ĝi. Post tio la fera ponto, ŝajnas, funkcias ne plu kiel trafikilo, sed ĉefe kiel historia objekto.


Oni diris, ke nun super la Flava Rivero estas entute pli ol 60 ŝoseaj kaj fervojaj pontoj. Sole en Lanzhou estas 17 tiuspecaj pontoj.

## ŜAFLEDA FLOSO

Ŝafleda floso iam funkciis kiel ĉefa veturilo por transiri la Flavan Riveron. Tamen, post apero de ponto super la rivero la ŝafledaj flosoj rolis ne tiel grave kiel antaŭe. Nun nur en la turismaj lokoj en la supra baseno de la

Baraĵo de Liujiaxia-akvokonservejo

Foto de REN SHIYIN







Norio ĉe la Flava Rivero

Foto de WANG YICHUAN



Safledaj flosoj



Kvinbudha pavilono de  
Tang-dinastio



Ŝtona budhostatuo en Bingling-  
templo



Argilaj budhostatuoj

rivero oni povas vidi ŝafledajn flosojn, kiuj servas speciale por distriĝo de la turistoj.

Foje, mi venis al la bordo de la rivero. Tie mi vidis, ke maljuna flosisto per oleita fadeno ligfermas la aperturon de ŝafleda floso. Mi kaj aliaj surpaŝis la floson por sperti la flosadon sur la Flava Rivero. Fakte, tiam estis seka sezono kaj la akvo ne estis profunda, nek torenta. Malgraŭ tio, sur la floso ni sentis timemon kaj ne kuraĝis nin movi.

La flosisto diris al mi, ke floso povas esti farita kaj el ŝafledo kaj el bovledo. Por fari floson oni devas senharigi tutan ŝaffelon kaj tani ĝin, poste oni verŝas iom da oleo sur ĝian reverson por ke la ledo fariĝu pli daŭrema. Oni devas firme ligfermi la aperturojn ĉe la kvar membroj kaj fari malgrandan truon al kruro por ke oni tra ĝi enblovu aeron en ŝafledan sakon. Kun pufigita ŝafleda sako lerta naĝisto povas sekure transiri la Flavan Riveron.

Por fari ŝafledan floson oni devas per ŝnuro ligi la preparitajn ŝafledajn sakojn al ligna framo. Granda floso konsistas maksimume el 600 tiaj sakoj kaj la malgranda el dekelkaj. Granda ŝafleda floso, samkiel granda ŝipo, povas transporti ĉiufoje ĉ. 30 tunojn da varoj je rapido de pli ol 200 km tage, kelkoble pli ol kamela karavano. Multaj lokaj produktaĵoj de Lanzhou siatempe transportiĝis tiamaniere al la malsupra baseno de la Flava Rivero.

## LA HIDROELEKTREJO LIUJIAxia

Liujiaxia (Liŭĝjaŝja) estas la unua hidroelektrejo de Ĉinio ĉe la Flava Rivero. Ĝia granda digo situas sudokcidente de Lanzhou je pli ol 70 km, en la sino de la montaro.

La hidroelektrejo, konstruita en la 60-aj jaroj, estas destinita ĉefe por elektro-produktado, kaj

krome, ankaŭ por irigaciado, fiŝbredado kaj gardado kontraŭ inunda kaj glacia katastrofoj. La fabriksituas duone sub la digo kaj duone en kaverno, t.e. subtera ŝtona urbeto kun areo de 200 000 kvadrataj metroj sub la riverujo je 50 m. Per lifto mi descendis 174 metrojn kaj atingis la domon, kie laboris 4 generataroj kaj la alia estis riparata. La centra regadejo superregas la tutan fabrikan pere de laborstablo, industria televido, komunikaj aparatoj kaj aliaj aŭtomataj instalaĵoj. La fabrika pordego povas hermetike fermiĝi en ajna tempo. Eĉ kiam akvo inundas la supron de la digo, nur se la pordego estas fermita, la fabriko estas tute ekster danĝero kaj la elektra produktado neniom malhelpita.

Liujiaxia estas la unua granda hidroelektrejo ĉe la Flava Rivero. Ĝia jara elektra produktokvanto estas 5.7 miliardoj da kWh. Ĝi povas konservi 5.7 miliardojn da kubmetroj da akvo.

Dank' al la granda digo de Liujiaxia, formiĝis granda akvokonservejo, kiu ludas gravan rolon por reguligi la akvokvanton de la Flava Rivero en ĝia malsupra baseno. Ĝi gardas Lanzhou kontraŭ inundo, garantias normalan produktadon de la elektoj en la malsupra baseno de la Flava Rivero eĉ en la seka sezono kaj liveras akvon por irigacio en la provinco Gansu kaj aŭtonomaj regionoj Ningxia (Ningŝja) kaj Interna Mongolio. Nun 85% de la kampoj en la malsupra baseno de la Flava Rivero estas irigaciataj. Dank' al ĝia reguligo, la regiono en Ningxia kaj Interna Mongolio, kiun trafluas la Flava Rivero je centoj da kilometroj, estas liberigita el detruado de glacia katastrofo kaj finiĝis la historio, en kiu oni forigis glacieron per bombardo. Kompreneble, tiu akvobredejo kun areo de 130 kvadrataj kilometroj donas rimarkindan ekonomian efikon.

## BINGLING-TEMPLO

Forlasinte Liujiaxia, mi daŭrigis mian vojaĝon per plezurŝipo pli ol 2 horojn kaj vidis Bingling-templon, faman ŝtonkavernaron ĉe la Flava Rivero. Mi elŝipiĝis kaj piediris al la templo. Prezentigis antaŭ miaj okuloj statuo de Budho 27 m alta, kun supra parto el ŝtono kaj la malsupra el argilo. Ĝi aspektas tre vigle malgraŭ la mil-jara erozio. Ĝi, kun mieno ĝoja kaj buŝo iomete malfermita, kvazaŭ predikas al la rigardantoj budhismajn sutrojn kaj misteron de la budha paradizo.

Mi proksimiĝis al la ŝtonkavernaro kaj vidis, ke la plurtavolaj kavernoj densas kiel ĉelaro kaj la budhaj statuoj brilas en la sunlumo.

Mi grimpis laŭ la ŝtonaj ŝtupoj kaj lignaj viaduktoj kaj pririgardis la budhaj statuojn sur la krutaĵo. Tie estas multe da niĉoj, skulptaĵoj kaj freskoj faritaj de la 4-a ĝis la 19-a jc. Nun tie restas 183 niĉoj, 694 ŝtonaj kaj 82 argilaj statuoj kaj 900 kvadrataj metroj da freskoj, kiuj ĉiuj troviĝas sur rokmuro 200 m longa kaj 60 m alta.

Bingling-templo distingiĝas per granda nombro da ŝtonaj skulptaĵoj kaj reliefoj. En la mezo de la ĉefa halo de la kaverno n-ro 3 staras ŝtona pagodo 2.27 m alta kun mil reliefigitaj budhaj statuoj. Ĝi nomiĝas Mil-budha Pagodo. Ekster la ŝtonkavernoj vidiĝas ankaŭ grandaj kaj malgrandaj pagodoj el ŝtono, tomboj de eminentaj budhistoj. La reliefoj plejparte estis faritaj de la disĉiploj de majstroj antaŭ aŭ post ties morto.

La nomo Bingling-templo ŝanĝiĝis plurfoje en la historio. La nuna nomo aperis en la 14-a jc. Bingling estas tibetlingva vorto kun signifo "sidejo de 100 miloj da budhoj". La templo estis kaj estas alte taksata de la budhistoj, artistoj, historiistoj kaj arkeologoj. ■



Danco de mjaŭ-oj

WANG HANPING:

## Mia dektaga vojaĝo en Guangxi (I)

**E**N la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono en la suda parto de Ĉinio loĝas ĝuang-oj, la plej granda nacimalplimulto de Ĉinio, jaŭ-oj, mjaŭ-oj, dong-oj kaj aliaj ses nacimalplimultoj. En aprilo 1996 mi kaj aliaj dekkelkaj raportistoj el Pekino kaj Hongkong kune vizitis la centran kaj nordan partojn de Guangxi. La tieaj moroj kaj ĉarmaj pejzaĝoj faris sur ni profundan impreson.

### EN LA HEJMLOKO DE KANT-FEINO

De Nanning, la ĉefurbo de Guangxi, ni veturis al Liuzhou, fama historia kaj kultura urbo. Ĝi estas grava industria urbo kaj trafika centro de Guangxi. La ĉarma Liujiang(Liŭĝjang)-rivero ĉirkaŭas la urbon en 3 flankoj.

Ni atingis la urbon la 3-an de la 3-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro, kiu estas la tradicia kant-festo de diversaj nacioj en Guangxi. Ĉi-jare la internacia polkanta festivalo okazis en Liuzhou. Pro

tio la tuta urbo estis plena de ĝojo kaj vikleco.

La ĝuang-oj estas lertaj en kantado kaj nedisigeblaj de popolkantoj en sia vivo. Sur la placo de la urbocentro ni vidis, ke multaj, ĉu junaj, ĉu maljunaj, ĉu konatoj, ĉu nekonatoj, reciprokas improvize popolkantojn. Tio okazas preskaŭ ĉiutage ankaŭ en parkoj de la urbo.

Ni vizitis la parkon Yufeng. En la urbocentro staras Yufeng-monto, ĉe kies piedo belas la Lageto Malgranda Drako. La pinto de Yufeng-monto similas al karmo saltanta el akvo, rigardate de la sudorienta bordo de la lageto. Legendo diras, ke la Tria Franjo Liu, kant-feino de ĝuang-oj, reciprokis tie popolkantojn kun loka provokema tirano kaj venkis lin en kantado. Tamen, reage kontraŭ la tirano, ŝi ĵetis sin en la lageton. Ĝuste tiam 2 grandaj karmoj, flugintaj el la ĉielo kaj aŭskultintaj ŝiajn kantojn, savis ŝin. Unu el la karmoj surdorse portis ŝin al la ĉielo, dum la alia transformiĝis en montpinton kaj subpremis la tiranon sub si. La legendo pri la Tria

Franjo Liu cirkulas de generacio al generacio. Pro tio Yufeng-monto kaj la Lageto Malgranda Drako fariĝis idealaj lokoj por la tieaj popolkantistoj. Dum la festivalo oni faris tie 3 terenojn por reciproki popolkantojn. Kaj la prezentadon ĝuis miloj kaj dekmiloj da turistoj.

Kelkajn kilometrojn sude de la monto estas la pitoreskejo Lageto Granda Drako kun densaj arbaroj. Tie pli ĉarmas la vilaĝoj de nacimalplimultanoj. En la festivalo ĝueblis ne nur popolkantoj de ĝuang-oj, sed ankaŭ dancoj de jaŭ-oj, festoetoso de mjaŭ-oj kaj konstruaĵoj de dong-oj.

## EN VILAĜO DE MJAŬ-OJ

Post trihora aŭto-veturado ni atingis la Rongshui-an Mjaŭ-nacian Aŭtonoman Subregionon kaj ŝipveturis sur Bejiang(Bejĝjang)-rivero.

La rivero kun akvo travidebla serpentas inter montoj. Ambaŭflanke de ĝi kreskas densaj arbaroj kaj bambuaroj. En ili kaŝiĝas lignaj etaĝdomoj de mjaŭ-oj kun aparta stilo. Post nelonge ni atingis Goutan-vilaĝon de mjaŭ-oj.

Kiam nia ŝipo albordiĝis, mjaŭ-aj gejunuloj en buntaj vestoj surborde ekblovis per naciaj muzikiloj por bonvenigi nin. Antaŭ la vilaĝo mjaŭ-aj knabinoj kun rideto proponis po tason da vino al ni ĉiuj. Laŭ la moro de mjaŭ-oj ni donis monon je nepara nombro (por mjaŭ-oj nepara nombro anoncas favoran aŭspicion) kaj poste trinkis po tason da teo kun la signifo eviti malfeliĉon.

Suprenirante laŭ montodeklivo, ni eniris en la vilaĝon. Antaŭ ni etendiĝis vasta ebena tereno, sur kiu mjaŭ-aj gejunuloj prezentis al ni siajn naciajn kantojn kaj dancojn. Intertempe ili invitis nin al dancado. Mjaŭ-aj junulinoj de tempo al tempo tretis niajn junulojn en okulvitroj kaj ruĝa vesto. Laŭ mjaŭ-oj, ruĝa vesto simbolas favoran aŭspicion kaj okulvitroj — erudicion. Kaj la mjaŭ-aj gejunuloj esprimas amon per tretado.

Antaŭ ol ni prenis manĝon en ligna etaĝdomo de mjaŭ-oj, la mastrino regalis nin per teo. Kiam ni satiĝis, mjaŭ-aj gejunuloj proponis al ni grandajn bovlojn da rizvino. Laŭ moroj de mjaŭ-oj, ĉiufoje oni devas trinki almenaŭ 3 bovlojn da vino. Mjaŭ-aj junulinoj konkure proponis vinon al niaj junuloj, sed ĉi tiuj ne kapablis trinki tiom da vino kaj devis forkuri. Iu el ni estis kaptita. Mjaŭ-aj junulinoj tiris lin je la oreloj, surtretis liajn piedojn, englutigis al li vinon kaj fine enbuŝigis al li bulon da glueca rizaĵo. Je tio ni ĉiuj eksplodis de rido. Kompreneble, neniu el ni povis fuĝi de la vin-atako.

## MOROJ KAJ KUTIMOJ DE DONG-OJ

De Rongshu ni veturis norden. Antaŭ ni aperis vicoj da lignaj etaĝdomoj el bluaj tegoloj alkroĉiĝantaj al montoj. Jen vilaĝoj de dong-oj. Ĉirkaŭ ili verdas antikvaj arboj kaj en ili imponas tamburo-

turoj kun plurtavolaj tegmentrandoj. Preter kaj tra vilaĝoj fluas riveretoj, super kiuj estas pontoj similaj al koridoroj. Sur kampoj kaj ĉe riveretoj antikvecaj norioj malrapide turniĝadas. Jen ni alvenis al la Sanjiang(Sanĝjang)-a Dong-nacia Aŭtonoma Gubernio.

La tieaj moroj, pluvo-vento-ŝirmaj pontoj kaj tamburo-turoj kun aparta stilo profunde impresis nin. Ni alvenis al pli-ol-70-jara pluvo-vento-ŝirma ponto ĉe la vilaĝo. Tie dong-aj gejunuloj en festaj vestoj staris ĉe la pontokapo por bonvenigi nin. Sed kiam ni alproksimiĝis al la pontokapo, ili baris al ni la vojon per ruĝa rubando kaj komencis reciproki kantojn kun ni. Ili kantis antaŭ ĉio la kaŭzon, kial ili baris al ni la vojon. Laŭ la moro kaj kutimo de dong-oj, ni devis respondi al ili ankaŭ per kanto,




Pluvo-vento-ŝirma ponto de dong-oj

tamen al ni, gastoj el malproksimaj lokoj kaj maller-taj en kantado, ili povis fari nenion alian ol cedi la vojon. Bari la vojon estas fakte aparta ceremonio de dong-oj por bonvenigi la gastojn. Tamen oni nepre devas trinki vinon el glueca rizaĵo proponitan de dong-aj knabinoj.

Enirinte en la vilaĝon de dong-oj laŭ la zigzaga vojeto el rulŝtonetoj, ni vidis la tamburo-turon starantan en la centro de la vilaĝo. Ĝi servas kiel kunvenejo kaj amuzejo de la vilaĝanoj. Sur la placo antaŭ la turo dong-aj gejunuloj prezentis al ni kantojn kaj dancojn. Akompanate de gastamaj dong-oj, ni venis en iliajn hejmojn. Kiel tamburo-turo kaj pluvo-vento-ŝirma ponto, la etaĝdomoj de dong-oj konstruiĝas sole el ligno tenonkunigita. La supra etaĝo servas kiel dormoĉambro kaj la malsupra kiel stalo kaj tenejo.

En restoracio ĉe pluvo-vento-ŝirma ponto ni ĝuis gluecan rizaĵon kaj acidajn manĝaĵojn kun dong-a gusto. En ĉiuj familioj de dong-oj troviĝas vazoj por acidigi legomojn, fiŝaĵojn kaj viandon kaj aliajn bongustaĵojn por regali gastojn. "Tostu, tostus! Trinku kaj manĝu laŭ plaĉo! Estu kiel hejme!" La tosta kanto ebriigis nin samkiel bongusta rizvino. ■



## SUR NIA LIBROBRETO

# Pri “222 Simplaj Versaĵoj por Komencantoj”

*222 SIMPLAJ VERSAĴOJ POR KOMENCANTOJ*, originale verkita de Laulum, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1995. Formato: 10.90 × 18 cm. Prezo: 7 USD.

Riĉa kolekto da etaj facile lerneblaj kaj memoreblaj poemoj, precipe por lernejoj, sed frandeblaj por ĉiuj aĝoj.

La aŭtoro ne preterlasis iun temon interesan, ekde nombrado, la homa korpo, aĝoj ĉirkaŭ ni, floroj, plantoj, bestoj, vetero, sezonoj, tempo, hazardaj rimarkoj, okazaĵoj, etaj fabloj versitaj. Senkonsidere al la temo, la mesaĝo estas ĉiam instrua. Jen kelkaj titoloj: Utilaj instruoj, Laboru sen laco, Faru bonan agon, Kunfrotu la manojn, Ne tempon perdu, Viro falis, Rido sanigas, Mi skribas leteron...

Gustumu iomete la du poemetojn:

### TEMPO

*Tenu en memoro:  
Tempo estas oro.  
Por la homa vivo  
gravas ĉiu horo!*

### LIBRO

*Ĝi ne estas arbo  
havas ĝi foliojn.  
Ĝi ne donas fruktojn,  
sed diversajn sciojn.*

La lingvo estas flua, kolorplena kun plaĉaj metaforoj. La versoj, kiel titolo anoncote, estas simplaj, sed ĉarmaj, ofte etaj gemoj. Kelkfoje ja okazas stumbloj, facile eviteblaj. En ĉi-speca libro mi evitus la elizion ĉe “estas”, ekz.: “Ili ’stas arboproduktoj”, “Ja ne frukto ’stas terpomo”. Ofte al mi

strangas la uzo de unuopaj prepozicioj: “bileto en ĉies bezono”, “ĉia ilo en utilo”, “Ne estis en tia tipo”, “perlaboru kun humano”, “kunagu kun plenforto”. Kial futuro anstataŭ kondicionalo: “Se la lingvon ĉiuj uzos, nin vojaĝoj pli amuzos”?

Ankaŭ ĉi tie min ĝenas la akcentado de “por komencantoj” eĉ en la titolo. Kial konstante subtenadi la emon al komencantismo? Komencanto ja estas nur la unua ŝtupo dum la lernado. Tie ni ĝin forlasu kaj strebu pluen.

Ĉi-preteraj rimarkoj cetere ne malhelpas frandi tiun ĉi bonvenan eldonaĵon, kiun mi varme rekomendas al ĉiuj instruistoj, lernantoj kaj ĉiuj gepatroj.

LUCIJA BORČIĆ (Kroatio)

La eta antaŭparolo, la titolo kaj eĉ la unuaj paĝoj de ĉi libro erarigis kaj iritis min: ĉu porinfana kiĉo aŭ siropo postkurso por amuzi la (eternajn) komencantojn? Ne eble! Tre baldaŭ mi konvinkiĝis pri mia misimpreso. Ja enestas “simplaj versaĵoj”, sed kiom da ĉarmo ili disradias! La didaktikaj rimoj paĝon post paĝo cedas al saĝaj meditoj, eĉ etaj traktatoj filozofiaj rivelas pli kaj pli la mondpercepton de la aŭtoro.

Alternas ĉi-libre trasentitaj natur-impresoj, homaj spertoj kaj propraj konvinkoj. Same varia kiel la tem-paletro montriĝas la versoj kaj la strofoj. De kurtaj kvarversoj ĝis baladeskaj rakontoj etendiĝas la prozodia oferto. Laulum lerte ekspluatas la rim-eblojn kaj po-et-doze uzas vortojn tro facilanime brulmarkitajn neologisme de eŭropaj ĝisostuloj.

# La sepa konkurso de EPĈ-legado

Jen venas la sepa konkurso de EPĈ-legado. Por la ĉi-foja konkurso estas 10 demandoj. Vi povas ĝuste respondi ĉiujn demandojn, se vi tralegis la artikolojn en n-roj 1-11 de EPĈ de 1996. Skribu la n-rojn de la demandoj kaj viajn respondojn sur papero kaj sendu ĝin antaŭ la 15-a de januaro 1997 al nia redaktoro s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037 Ĉinio.

La gajnintoj de la konkurso ricevos ĉinan metiartaĵon aŭ novan libron eldonitan de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĉiuj aliaj partoprenantoj de la konkurso ricevos memoraĵon. Estos bonvenaj kritikoj kaj proponoj pri la konkurso.

Plenigu la blankojn per ĝustaj respondoj.

1. La Unua Azia Kongreso de Esperanto okazis en Ŝanhajo aŭguste de 1996. La kongresa temo estis
2. Tiel inter Ĉinio kaj la Romana Imperio aperis internacia vojo destinita ĉefe por silkaĵa komercado. En 1877 germana geografo en sia verko "Ĉinio" donis al la vojo belan nomon Silka Vojo.
3. , kies totala areo estas pli ol 1.6 milionoj da kvadrataj kilometroj, kun 3 basenoj inter 3 grandaj montaroj.
4. Nia estimata samideano d-ro Andrè Albaut demisiis post sia 12-jara intensa klopodo sur la posteno de prezidanto de . D-ro Werner Bormann (Germanio)

daŭrigas lian oficon.

5. " " estas mita romano tre fama en Ĉinio. Ĝi estis verkita surbaze de la historio pri pilgrimado de Xuanzang al Hindio. Sun Wukong, heroo de la romano, estis superhoma simio, kiu protektis sian majstron Xuanzang en la pilgrimado kaj venkis multajn malfacilojn sur la vojo. La romano kaj heroo estas ŝatataj de ĉinoj.

6. Paro da pandoj en la zoo de Hangzhou, Zhejiang(Geĝjang)-provinco, pasigis lastatempe sian -jariĝon. Ĝenerale, la pandoj, pli-ol-20-jaraj, povas esti rigardataj kiel longvivuloj.

7. , kaj , prapatroj de la ĉina nacio, iam kolektiĝis en Zhuolu en la nuna Hebei-provinco. La tri grandaj triboj estrataj de ili fariĝis tribo-unuiĝo, la plej frua en la ĉina historio.

8. Vejĉio originis de . Vejĉi-tabulo estas formita el 19 horizontalaj kaj 19 vertikalaj linioj, kun 361 krucpunktoj.

9. La ĉinaj klasikaj literaturaĵoj "Mirrakontoj de Liaozhai" kaj "Ruĝdoma Songŝo", eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, estas esperantigitaj de la membroj de la Akademio de Esperanto s-roj kaj

10. Antikvaj ĉinoj inventis alĥemion por ŝanĝi metalojn en eliksiron. Anstataŭ trovi eliksiron por senfine daŭrigi la vivon, ili trovis metodojn fari

La poemoj de Li vortigas universalajn sentojn, spertojn kaj konvinkojn. Ĉineco tamen ĉie delikate kolorigas la eldirojn, foje eĉ — en tekstoj legendecaj — malfonas kaj difinas la scenon. La antaŭlasta teksto (Ĝinglo-ekzerco) nin kondukas en la mil-jaran tradicion de la ĉina medicino, en la sekretojn de la akupunkturo:

*Se ilin vi masaĝe premos,  
po du sekundojn ducent-foje,*

*la sano via senproblemos  
kaj vi vivos sane, ĝoje. (p. 125)*

Per ĉi nova verko Laŭlum establiĝis en nia parnaso, ne nur konfirmis sin lingva virtuoza, sed ankaŭ sin rivelas humur-plena, delikat-senta kaj vast-anima poeto. El ĝi egale tiros profiton la kelkcent-radikaj kurs-finintoj kiel la venkintoj de ĉiuj obstakloj.

**REINHARD HAUPENTHAL** (Germanio)

# Ponto al resaniĝo



Pacientoj konsultas komputeron pri kuracado.

**M**ALSANULO ĝenerale vizitas kuraciston. Tamen por la homoj suferantaj de kronika aŭ malfacile konstatebla malsano, konvenaj kuracmetodo kaj kuracisto estas urĝe bezonataj. Ĝuste por liveri al la socio informojn pri kuracado, oni fondis en Pekino la Porsanan Klubon Yisheng. Nun inter la pekinanoj cirkulas la diro: “Kiu malsaniĝis, konsultu Yisheng.”

Oni povas konsulti Yisheng en tri manieroj.

La unua: telefoni. Ĉiumatene je 10:00-11:00 funkcias la programo “Kuraca konsultiĝo” per du varmaj lineoj en Radio Pekino, la plej granda en Ĉinio. En la klubo telefona servo daŭras 24 horojn ĉiutage. Kaj en Pekino ankaŭ estas la telefonserva

stacio 160, kiu donas diversajn konsultiĝojn.

La dua: legi ĵurnalon. En “Popola Ĵurnalo (transmara eldono)” kaj “Scienc-teknika Ĵurnalo” malfermiĝis la rubriko “Kuracado kaj Sanprotektado de Yisheng”. Krome la klubo mem eldonas la monatan gazeton “Kuraca Konsulto de Yisheng”. En tiuj eldonaĵoj oni povas trovi multe da informoj pri kuracado de oftaj kaj malfacile kuraceblaj malsanoj.

La tria: konsulti komputeron. En la internacia komputera interreto la klubo enlistigis ĉinajn medicinaĵojn kaj ĉinmedicinajn kuracistojn, kiuj reprezentas la kurac-nivelon de Ĉinio. Pere de tiu interreto eksterlandaj suferantoj povas trovi koncernajn informojn pri ĉinaj medicinaĵoj kaj ricevi kuracadon de ĉinmedicinaj kuracistoj.



En mallonga tempo la klubo gajnis fidon per siaj aŭtoritateco kaj servoj en kuracado. Nun en la daten-banko de Yisheng konserviĝas 100 000 informoj pri miloj da hospitaloj, inkluzive de la 500 grandaj kaj mezgrandaj enlandaj hospitaloj. Menciante la intencon fari komputeran reton kaj kuracan konsultiĝon, kontoristoj de la klubo ofte rakontis jenan okazaĵon: Iu suferanto de nuk-vertebra malsano, akompanate de parencoj, venis en Pekinon por kuracado. Ili foruzis milojn da juanoj por vojaĝo, loĝado kaj kuraco. Poste oni informis ilin, ke ĝuste en la gubernia hospitalo najbare de ilia hejmloko estas speciala ambulatorio por kuracado de sama malsano, kaj tie por la sama malsano oni postulas nur centojn da juanoj. Tiaj okazaĵoj estas sennombraj. Tial necesas starigi rilatojn inter kuracistoj, kurac-organizaĵoj, medicinaj entreprenoj kaj suferantoj. Por tiu celo dekelkaj junuloj plimultigis medikamentajn informojn en la daten-banko kaj fondis la Porsanan Klubon Yisheng.

Ekde sia fondiĝo ĝis nun la klubo jam helpis centmilojn da suferantoj per kuracaj informoj. Ĉiutage ili ricevis leterojn kaj konsultajn telefonaĵojn el diversaj lokoj. Foje perturbiĝis la telefono de la varma lineo en Radio Pekino. Tuj post riparado la telefonisto prenis la aŭdilon kaj ekparolis, antaŭ sonado de la telefono. Rimarkinte la surpriziĝon de la alparolato, li tiel klarigis: "Ĉiam, kiam oni prenas la aŭdilon, ĉe la alia ekstremo de la lineo la suferanto estas atendanta."

S-ro Liu Yihua, profitinto de la konsultiĝo, diris: "Ne estus nia ĝojo sen penado de kontoristoj de la klubo." Lia filino denaske havis multajn ruĝajn nevusojn sur la vizaĝo. Li kaj lia edzino petis multajn kuracistojn, tamen la kuracado ne efikis. La Yisheng-anoj rekomendis specialiston al ili. Post trimonata kuracado mirakle malaperis la nevusoj. Ĝojo denove aperis en la familio de s-ro Liu.

Iun tagon de 1995 la klubo ricevis leteron de fraŭlino Tian. Ŝi suferis de terura dermatozo 20 jarojn, kaj ĉiuj kuracoj malsukcesis. Ŝi rigardis Yisheng kiel sian lastan esperon. Traleginte la leteron, kontoristoj de la klubo surdiskigis ŝiajn simptomojn, tamen en komputero ne ekzistis koncernaj informoj. La kontoristoj sin turnis al specialistoj en Pekino, kiuj diagnozis, ke fraŭlino Tian estas suferanta de malofta dermatozo, nome skvama malsano, por kiu ne ekzistas efika kurac-metodo. Post serĉado de plia monato la Yisheng-anoj informiĝis, ke en la norda urbo Dalian troviĝas maljuna ĉinmedicina kuracisto Zhou Mingqi (Ĝoŭ Mingĉji), kiu lertas en kuracado de skvama malsano. Tamen, kiam ili vizitis la hospitalon, en kiu la maljunulo laboris, oni diris al ili, ke li mortis. Ili ne rezignis la serĉadon. Poste ili trovis kuraciston Zhou Shengping (Ĝoŭ Ŝengping), filon de s-ro Zhou Mingqi. Fraŭlino Tian diris al la Yisheng-anoj telefone: "Mi tuj iros por kuracado. Vi donis al mi fidon pri la vivo. Mi esperas vesti min



Inform-kunveno de la porsana klubo Yisheng

per jupo kiel eble plej frue."

Por la klubo oftaj estas tiaj ekzemploj, el kiuj la kontoristoj komprenis: Kvankam la klubo ne estas hospitalo, tamen fakte ĝi rolas same grave kiel hospitalo. Nun la klubo havas dekmilojn da membroj. Kompare kun aliaj suferantoj, la membroj ĝuas ne nur zorgon de la klubo, sed ankaŭ favoron ricevi la unuaj konsultiĝan servon.

La klubo faris sankarton por ĉiuj membroj, petis specialistojn doni regulan konsultiĝon kaj senpagan kuracadon kaj laŭ la peto de suferantoj aĉetis kaj sendis medikamentojn al ili. En sia naskiĝtago ĉiu membro ricevis salutkarton el la klubo kaj aŭskultis en radio salutkanton, menditan de la klubo. La klubo ankaŭ okazigis interkonan kunvenon, por ke la membroj amikiĝu por kune batali kontraŭ malsano kaj firmigi la volon plu vivi.

Se iu el la membroj resaniĝis, tion oni celebris kaj dankis la klubon. Por la suferantoj la klubo estas ponto al resaniĝo. ■

## Anonceto

Japano Esperanto-  
Korespondo-Servo ĉiam kon-  
stante akceptas korespondo-  
proponojn kun japanoj. Skribu  
unuope, al ĝi; ĉe KLEG, Sonehi-  
gasi 1-11-46-204, Toyonaka-si,  
561 Japanio

### LUEBLAJ VETURILOJ EN PEKINO

La plej fruaj lueblaj veturiloj en Pekino estis ĉevalĉaroj, kiuj furoris en la dinastio Qing (1644-1911). Tiaj ĉaroj kun ŝirmiloj veturis inter la urbaj kvartaloj kaj antaŭurbaj vilaĝoj. Oni diris, ke la tirana imperiestra patrino Cixi (Ciŝji) siatempe forkuris el Pekino per tia ĉaro.

En la komenco de la 20-a jc fremdlandaj kaleŝoj enkondukiĝis en Pekinon kaj furoris en la urbo. Tiam multaj nobeloj kaj riĉuloj aĉetis ilin kaj en multaj lokoj de la urbo oni povis aĉeti aŭ lui kaleŝojn. Oni diris, ke en 1931 la kaleŝoj atingis sian kulminon de disvolviĝo en Pekino kaj post 10 jaroj fariĝis pli kaj pli malmultaj, ĉar tiam aperis aŭtomobiloj.

Tiam ofte videblis ankaŭ rikiŝoj. Ĉar ili enkondukiĝis el Japanio, tial la ĉinoj nomis ilin japana veturilo. En 1940 aperis triciklo, kies antaŭa rado similas al tiu de biciklo kaj kies malantaŭa parto estis destinita por pasaĝeroj. Tia triciklo videblas en Pekino ankaŭ hodiaŭ. Multaj eksterlandanoj ŝatas veturi per tia triciklo por ĝui pekinajn pejzaĝojn. Krom tio, estis lueblaj ankaŭ azenoj, kiuj iris inter la urbaj kvartaloj kaj antaŭurbaj vilaĝoj. Tiam la luanto rajdis sur la azeno kaj la luiganto sekvis la beston. Tiaj azenoj estis anstataŭitaj poste de aŭtobuso.

La unua taksiejo en Pekino estis funkciigata de franco en 1913. Post tio ĉinoj establis taksie-



Taksioj en Pekino

jojn Tianjin, Fuxing k.a. La Pekina Tramkompanio estis ekkonstruita en 1921 kaj inaŭguris la tram-trafikon en la 18-a de decembro 1924.

Pekino ekhavis aŭtobusojn en aŭgusto 1935.

Hodiaŭ diversaj taksioj kuras sur la stratoj de Pekino.

### ARTE PRODUKTITAJ URSOJ

Nigra urso Panpan singardeme rampis el kaĝo. Ĝi estas 4-jara. Kiam ĝi metis siajn dikajn piedojn sur la nigran teron kovritan de arbofolioj en Changbai-montaro, ĝi sin pafis en la primitivan arbaron, tute ne aspektante kiel antaŭe milda kaj stulteta. Ĝi kaj aliaj 5 kolegoj estas la unuaj arte produktitaj ursoj en Ĉinio. Ili revenis en la naturon kaj komencis novan vivon en la natura medio.

La gepatroj de tiuj 6 ursoj estis sovaĝaj kaj iam vivis en la Ursa Ĝardeno, Yanbian-a Korea Aŭtonoma Subprovinco, nordorienta Ĉinio. Jam en la aĝo de 2 jaroj tiuj 6 ursoj komencis trejniĝon, ekz. serĉi manĝaĵojn printempe, aktivi somere kaj dormi vintre. Jen ili revenis en la naturan arbaron, kie vivis iliaj prapatroj de generacio al generacio. Sciencistoj povas kontroli ilin 3 jarojn pere de radiodetektilo pendanta sur ilia kolo. Nun la 6 ursoj vivas sur tereno 12-18 km for de la loko, kie oni liberigis ilin. Post nelonge ili fiksloĝos ie kaj komencos sian vintran dormon.

Ĉinio estas lando kun multaj ursoj. Nun en la mondo vivas 6 specioj da ursoj, kaj en Ĉinio vivas ursoj nigraj, brunaj kaj malajaj.

Por protekti la pereontajn bestojn, la Ursa Ĝardeno komencis en 1993 esploron pri liberigo de arte produktitaj ursoj. Por tio ili elspezis 3 milionojn da juanoj en 3 jaroj.

### MALNOVA SEĜO EN LA IMPERIESTRAL PALACO

En la Imperiestra Palaco de Pekino estas pli ol miliono da trezoroj, inter kiuj estas malnova seĝo altiranta multajn vizitantojn ĉiutage.

La seĝo estas nenio alia ol la imperiestra trono. Kiel simbolo de imperiestra potenco, ĝi staras meze de Taihe-halo, en la centro de la ĉefurbo. 24 suverenoj de la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing regis Ĉinion entute pli ol 500 jarojn, sidante unu post alia sur tiu seĝo.

Sur la trono 1.3 m alta estas skulptitaj oraj drakoj, kun inkrustaĵoj de gemoj. Sur ĝiaj kvar cilindraj subteniloj estas 4 drakoj flugantaj supren. La trono majestas sur alta soklo el Nanmuligno en la grandioza halo.

HE YANGUANG:

# Festo de fiŝistoj



**P**RINTEMPA vento blovis kaj la ĉielo kaj maro estis bluaj.

La fiŝistoj de la vilaĝo Zhougezhuang finfine ĝisatendis la 18-an de marto, la feston de fiŝistoj, en kiu la fiŝistoj komencas fiŝkapti en la maro:

La fiŝista vilaĝo situas sur Shandong-duoninsulo, proksime de la Flava Maro. En la vilaĝo ankoraŭ konserviĝas la tradicia kutimo kulti la maron, alivorte, celebri la feston de fiŝistoj aŭ feston de komenciĝo de fiŝkaptado. Tiutage la fiŝistoj alluas ruĝan paperon kun ideogramo signifanta "feliĉo" al siaj pruoj. Ambaŭflanke de la ideogramo pendas ruĝaj paperoj kun versduo:

*Maro donacas riĉaĵon,  
Estas senlima feliĉo.*

Regis granda spektaklo en la ĉi-

jara festo. Frumatene, 60 velŝipoj bonorde ankrumis ĉe la maro. Oni viciĝis tie kun bambukanoj kaj fiŝ-



Fiŝkaptaj ŝipoj ekveturontaj

# Por la sekureco de la popolo

de SUN AIJUN

**L**A 25-an de aprilo 1996 la urba juĝejo de Dashiqiao, Liaoning-provinco, Ĉinio, faris juĝadon de la loka krima bando de huliganoj "5 fratoj Guo". La tribunalo kondamnis 3 el ili al morto. La loĝantoj kun granda ĝojo cirkuligis inter si la ĝojigan informon.

La 5 fratoj Guo estis fifamaj en la urbo jam de longe. En pluraj jaroj ili faris tumulton, friponadon kaj batadon. Foje ili baris la vojon al veturilo kaj vundis la veturigiston. Ili per ŝipo koliziis kun piediranto kaj forte batis lin. Per glavo ili hakis loĝanton kaj serioze kripligis lin. Plurfoje ĉan-

taĝinte iun lokan individuan minej-entrepreniston, la 5 fratoj Guo akiris grandan monsumon, per kiu ili konstruigis por si etaĝdomon kaj aĉetis al si aŭton. La 5 fratoj Guo kaj iliaj komplicoj ege minacis la sekurecon de la vivo kaj havaĵoj de la tieaj loĝantoj. Por garantii la sekurecon de la popolanoj, lastatempe la koncernaj departementoj de la loka registaro alprenis severajn rimedojn kontraŭ la friponaj krimagoj. La kondamno al la 5 fratoj Guo ja estas ekzemplo.

Ĝenerale dirite, la ĉina socio estas sekura, tamen kun senĉesa disvolviĝo de la reformado de la ekonomia sistemo, oni reordigis la

rilatojn de la interesoj de diversaj soci-tavoloj, kio kaŭzis multajn sociajn konfliktojn. En iuj lokoj aperis krimaj bandoj kaj friponoj kun karakteroj atencantaj la socion; okazis plurfoje kazoj de mortigo kaj prirabado; reaperis kaj disvastiĝis prostituado, vendo kaj fumado de narkotaĵoj, kiuj ĉiuj jam malaperis por longa tempo post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Se oni ne ĝustatempe likvidos tiajn fenomenojn, ili certe kaŭzos gravan malutilon al la popola vivo kaj socia sekureco. Ĝuste pro tio, en aprilo 1996 la ĉina registaro decidis dediĉi grandan forton al batalo kontraŭ seriozaj krimagoj en la tuta lando.

retoj sur la ŝultroj. Flosaĵoj estis ligitaj al la bambukanoj, sur kies pintoj pendis koloraj flagoj, simbolo de riĉa rikolto kaj ankaŭ marko de boato. Kiam tute tagiĝis, 60 kulto-tabloj, kiuj reprezentis la 60 ŝipojn, jam estis metitaj ĉe marmalprofundaĵo. Sur la tabloj estis kultataj kolorigitaj farunaj bonaŭguroj: fiŝoj, salikokoj, persikoj (simbolo de longviveco) kaj dioj de riĉiĝo, ĉiu kun pezo de 3-4 kg.

Kaŭrante sur la terlito en sia nova domo, 56-jara ŝipestro Liu malrapide matenmanĝis kaj atendis, ke aliaj 7 ŝipanoj ŝultre portu oferaĵon. Li diris, ke ilia ŝipo estis aĉetita de iliaj 8 familioj.

Ofte ventegas sur la maro. Antaŭe nemalmultaj fiŝistoj de la vi-

laĝo perdis sian vivon, boate kaptante fiŝojn en ĝi. Kiam fiŝistoj ekveturis sur la maron, iliaj edzinoj preĝis apud la maro aŭ en templo por sekurigi la fiŝkaptadon.

La edzino de Liu diris, ke post kiam la 8 familioj komencis kune fiŝkapti, ilia vivo multe pliboniĝis. Lastjare ŝi kaj ŝia filino vojaĝis al Pekino por dekelkaj tagoj. Ŝia plej juna filino lernis en Japanio por poste prilabori marproduktaĵojn en la patrolando.

Subite aŭdiĝis tamburado kaj fajraĵ-krakado sur la strato. Komenciĝis ceremonio por kulti la maron sur la granda scenejo de la vilaĝo. En ĝi partoprenis pli ol 10 000 personoj.

Antaŭe fiŝistoj invitis popolan

teatran trupon por prezentado en la ceremonio, sed nun ili venigis la profesian. Plej gajaj estis la infanoj, kiuj ludis kaj transkapiĝis sur kabloj. La geamantoj, kiuj rigardis teatron sur ŝipo, venis de urbo pli ol 50 km fore.

Iu maljuna fiŝisto diris, ke multaj urbanoj forlasis sian oficialan laboron kaj ekkomeris, dum la fiŝistoj, krom kapti fiŝojn, ankaŭ entreprenas fridigadon, kulturaĵon, ŝipriparadon kaj negocon pri marproduktaĵoj. En la lasta jaro la 800 familioj de la vilaĝo enspezis 8 milionojn da juanoj el fiŝkaptado. Antaŭe ili enviis urbanojn, kiuj ricevis salajron ĉiumonate, sed nun ili ne plu estas tiaj, ĉar ili lukras pli multe ol la urbanoj. ■

Post la komenco de tiu batalo venis senĉese ĝojigaj informoj: la policanoj solvis kazojn de prirabado, perfortado, friponado, kaptis bandojn de aŭtoŝtelo, de kontraŭleĝa vendo de pafiloj ktp. Nur en kelkaj monatoj la policanoj malkovris iujn gravajn kazojn atentatajn de la tuta socio, arestis ne nur iujn krimajn bandojn kun karakteroj atencantaj la socion, sed ankaŭ iujn gravajn eskapintajn krimulojn kaj malpermesis funkciadon de multaj amuzejoj, kiuj entreprenis kontraŭleĝajn kaj krimajn aktivadojn. La batalo estas laŭdata de diversaj sociaj rondoj. La popolo varme subtenas ĝin.

Malamegante la krimulojn, kiuj damaĝis la socian stabilecon, la popolanoj tuj denuncas ilin, kio tre utilas al la batalo. Sole en la provinco Hunan la policaj departementoj ricevis multajn popolajn denuncojn kaj kaptis 1 800 krimulojn nelonge post la komenco

de la batalo.

Por garantii la socian stabilecon la policanoj faris multon kaj ne vanigis la esperon de la popolanoj. Jen 2 ekzemploj: iutage en Beihai de Guangxi 2 gangsteroj per glavo faris rabon. Informiginte pri tio, s-ro Pan Anrong, estro de la proksima policejo, tuj rapidis al la prirabejo kaj brave batalis kun la krimuloj. Kiam aliaj policanoj atingis la lokon, s-ro Pan estis jam grave vundita. En la urbo Changchun, Jilin-provinco, estas alia brava policano, 35-jara Zhong Chen. Por plenumi sian taskon li ne hejmeniris dum 3 monatoj. Pro lia elstara konduto kaj tiu de liaj kolegoj, oni honoris ilin per triagrada kolektiva merito. Dank' al la lojalaj kaj bravaj policanoj, kiaj Pan kaj Zhong, la popolanoj sentas sin sekuraj.


La socia sekureco estas reflektito de diversaj sociaj problemoj. Por ilin komplete solvi necesas

penado de la tuta socio. Antaŭ 2 jaroj malmultaj el la elprizonigitoj faris recidivon. Pro tio la loka registaro ellaboris novan principon por laborigi la elprizonigitojn, kies 90% nun havas novan laboron, kaj nur tre malmultaj el ili faris recidivon. Multaj popolanoj fervore edukas la antaŭajn krimulojn kaj deliktulojn. En la urbo Anshan estis maljunulino, kiu volonte helpis multajn junajn deliktulojn. En 1995, kiam ŝi forpasis pro malsano, eĉ milo da antaŭaj krimuloj kaj deliktuloj, helpitaj de ŝi, partoprenis sian funebran kunvenon.

Ĉiuj bone scias, ke la socia stabileco estas nemankigebla por glata reformado, sukcesa ekonomia kaj socia disvolvigo, kiuj siaflanke akcelas la socian stabilecon, tial la ĉina registaro en la severa batalo kontraŭ la krimagoj faras ĉion eblan por progresigi la reformadon, disvolvi la ekonomion kaj garantii la socian sekurecon. ■

## Juneco taŭgas por ĉio

Karikaturo de MIAO WEI



### EKONOMIO

● La Ĝenerala Ekspluata Kompanio de la Projekto de Tri Gorgoj de Ĉinio anoncis en julio, ke ĝi adjudikos internacie aĉetadon de ekipaĵoj de la unuaj 14 hidroturbinaj generatoraroj por la projekto.

Glate iras diversaj preparoj de la Projekto de Tri Gorgoj por bari la riveron en 1997. Antaŭiras fosado de la bazo de la maldekstraborda elektrejo kun la unuaj generatoraroj kaj estos garantiita la plano, ke la unuaj generatoraroj estos lanĉitaj al produktado en la jaro 2003. La kapacito de la adjudikotaj generatoraroj estos 700 000 kilovattoj. La adjudiko-akiranto povas esti unuopa entreprenisto aŭ kompanio kun leĝa personeco.

● En la interno de la dezerto Taklimakan en Xinjiang (Ŝingĵang), Maro de la Morto, kie la vaporiĝkvanto superas la precipitiĝkvanton, estas fosita pli-ol-5 000-metre profunda puto kun taga akvoellaso de ĉ. mil kubmetroj. Kaj tiel solviĝis la problemo pri akvo por la pli ol 30 000 petrol-laboristoj en Tarim.

● La 15-an de junio okazis la 7-a Ekonomia kaj Komerca Foiro en Harbin, Ĉinio. En ĝi eksponiĝis pli ol 20 000 specoj da ĉinaj kaj alilandaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktoj, malpez-industriaj produktoj, maŝinoj, kuraciloj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. En la antaŭaj samspecaj foiroj la partoprenantoj venis ĉefe el Rusio kaj aliaj landoj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj najbaraj landoj de Ĉinio. En la ĉi-foja foiro partoprenis ankaŭ landoj de Eŭropo kaj Ameriko.



En la 7-a Ekonomia kaj Komerca Foiro en Harbin

● Jam estis lanĉita la konstruado de 8 000-kilometra fotokablo, kiu komenciĝas de Ĉinio, traŭrante Vjetnamion, Laoson, Tajlandon kaj Malajzian, kaj finiĝos en Singapuro. Ĝi interligiĝos kun la eŭrazia fotokablo kaj kun la internacia marfotokabla sistemo de la Hindia Oceano pere de

Singapuro.

● La vertikala vosto el komputa materialo por la ĉina aviadilo Yun-7 de tipo 100, la plej granda parto de aplika komputa materialo por la ĉina civila aviadilo, estis muntita en la Aviadila Industria Kompanio de Xi'an (Ŝji'an) antaŭ nelonge.

Projektado kaj fabrikado de aviadila komputa-materiala parto estas unu el la altaj teknikoj en la mondo. La nove elfarita vertikala vosto altas 4.56 m kaj areo 10 kvadratajn metrojn. Ĝi konsistas ĉefe el vertikala stabiliga ebena kaj rudro. Tio markis, ke la ĉina tekniko fari aviadilan komputan materialon jam atingis la internacian avangardan nivelon.

### ARKEOLOGIO

● Farante protektan traktadon al la kadavro de virino, malkovrita en Loulan kaj sensaciata la arkeologian rondon de la mondo, Tian Lin, vicprofesoro de la Xinjiang-a Muzeo, trovis probable proteinan ŝmirajon sur la kadavro. Tio defiis la konkludon de la internacia akademio rondo, ke la kadavro estas sekigita nature. La 3 800-jara kadavro estis elterigita de Xinjiang-aj arkeologoj en la interno de la dezerto Taklimakan en 1980.

● Aro da raraj historiaj objektoj, inkl. de oraj moneroj kaj pecetoj de vitraj ornamaĵoj de la Orienta Romio estis elfosita antaŭ nelonge en tombo de Tang-dinastio (618-907) en Ningxia (Ningŝja), Ĉinio. Ili estas tre valoraj por esplori la kulturen interŝanĝon inter Ĉinio kaj la Okcidento.

### MEDICINO

● De multaj jaroj la ĉinaj lasermedicinaj fakuloj ne nur turnas sian atenton al klinika praktiko, sed ankaŭ plifortigas studadon pri la bazaj teorioj. Ili sukcese elfaris fotofibron por transmisi laserenergiecon de karbona dioksido kaj esploras laserĉelan mikrofaskan aparaton, ĉelboradon kaj kromosoman sekcadon per laserĉela sekcilo kaj transgenan kaj transkromosoman eksperimentadon per fotopinĉilo.

● En Ĉinio dekoj da grandaj hospitaloj kuracas rapidan nenormalan ritmon de la koro per radiofrekvenca ablacio-tekniko kaj akiris bonan efikon precipe en kuracado de spasma kaj ventrikla takikardio.

### KULTURO

● En 1995 en Ĉinio funkciis 17 000 mezgradaj kolegioj kun 9.39 milionoj da lernantoj, pli ol 2 000 enoficigaj trejnejoj kaj 400 000 diversaj trejnaj organizoj. Kiel grava konsistiga parto de la ĉina eduka afero, ili trejniis centojn da milionoj da homoj.

● En la 27-a Internacia Olimpika Fizika Kon-

kurso de Mezlernejanĵoj, okazinta en Norvegio en julio 1996, Liu Yurun (Liŭ Jujun) el Pekino finis ĉiujn teoriajn demandojn antaŭtempe je unu kaj duona horoj pli ol la difinitaj 5 horoj kaj gajnis la plenan poentaron. La 5-horan eksperimentan ekzamenon li plenumis je 20 minutoj pli frue. Li okupis la unuan lokon per sia totala poentaro.

- La Ĉina Belarta Domo kaj famaj germanaj geamatoroj Irene kaj Peter. Ludwig subskribis donac-interkonsenton.

Laŭ la interkonsento la Ĉina Belarta Domo starigos "Internacia Arta Eksponejo de Ludwig", cele havigi al si mondnivelajn artaĵojn. Baldaŭ okazos en la domo ekspozicio de modernaj eŭropaj artaĵoj, donacitaj de la geamatoroj Ludwig. En ĝi eksponiĝos 4 pentraĵoj de Picasso, unu el ili estis farita 5 monatojn antaŭ lia forpaso kaj 2 estis faritaj de li en la aĝo de 91 jaroj.

- Sub iu riverlito en Yongfeng-gubernio, Jiangxi (Ĝjangŝji)-provinco estas granda kvanto da blankaj, flavaj, ruĝaj, nigraj kaj alikoloraj naturaj ŝtonoj, formitaj el fosilioj de pratempaj algoj. Lokanoj faras el ili ornamaĵojn, ekranojn, inkujojn, te-servicojn kaj aliajn, kiuj havas altan valoron de aprecado kaj konservado.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

- La 3-an de julio 1996 estis sukcese lanĉita la sputniko "Yatai 1A" en la kosmonaŭtika urbo de Xichang (Ŝjiĉang), Sichuan-provinco. Tio estas la 41-foja lanĉado de la serio de transportaj raketoj Changzheng de Ĉinio, kaj ankaŭ la 10-foja spaco-flugo de la transporta raketo Changzheng n-ro 3.

La sputniko estis produktita de la Usona Hughes-kompanio kaj disponigata de la Yatai-a Limigita Kompanio de Telekomunika Sputniko, por doni telekomunikajn servojn al la regiono de Azio kaj Pacifiko.

### TURISMO


- En la regiono de Changbai-montaro, nordorienta Ĉinio, oni disvolvis turisman kanjonon, kiu longas 40 km, profundas pli ol 300 m kaj larĝas pli ol 200 m. Ĝia fundo estas zigzaga kaj tie torentas fluo. Ambaŭflanke de la kanjono staras diversaj arboj kaj imponas diversformaj lafoj el vulkanoj.

### SOCIO

- La familio de Xue Fengqi (Ŝjue Fengĉji) el 114 membroj en Ŝanhajo estas konata kiel la plej granda familio en Ĉinio. Xue Fengqi estas 99-jara

kaj lia edzino Fan Mingzhen 88-jara. Ili havas 2 filojn kaj 10 filinojn. Post ekpraktikado de naskolimigo en Ĉinio ĉiuj membroj de la familio bone observas la politikon.

- Por celebri la revenon de Hongkong al la patrolando en 1997 la fratoj Lu Wenrui (Lu Ŭenŭuj) kaj Lu Wenyan, prezidanto kaj vicprezidanto de la Direkcia Buroo de la Hongkong-a Grupo Jung Li, decidis monhelpi al la Ĝenerala Kompanio de la Familia Vino de Cao Xueqin (Caŭ Ŝjueĉin) en Tangshan, Hebei-provinco, por produkti 1997 vazojn da vino, kiuj estos transportitaj al Hongkong per specialaj aŭtoj antaŭ la 1-a de julio 1997 kaj donacitaj al ĉiuj tieaj grandaj restoracioj, por ke la Hongkong-anoj celebru la revenon.




Prilaboritaj naturaj ŝtonoj

### MEDIPROTEKTO

- La Pekina Breda kaj Reprodukta Centro de Pereontaj Bestoj unuafoje sukcesis en natura kovado de krosoptilo (*Crossoptilon manchuricum*) lastatempe.

Krosoptilo, propra al Ĉinio, estas rara birdo unuarange protektata de la ŝtato. Antaŭe oni prenis artan rimedon por kovi ĝiajn idojn, kaj ĉi tiuj preskaŭ perdis sian sovaĝecon kaj vivipovon surkampe, vivante ekster la sovaĝa medio. La sukcesa kovado de la idoj for de la sovaĝa medio fundamentis la revenigon de la birdoj al la naturo.



La turisma kanjono en Changbai-montaro

# Naskiĝloko de antikvaj raketoj

de LI YUTING

**K**IE estas naskiĝloko de antikvaj raketoj? Pri tio estis diversaj opinioj dum longa tempo. Iuj diris, ke raketoj naskiĝis en Hindio, kaj aliaj asertis, ke ili naskiĝis en la Okcidento. Kun ĉiam pli profunda esplorado pri la historiaj materialoj diverslandaj fakuloj venis al la konkludo, ke Ĉinio estas ilia naskiĝloko.

Jam en la antikveco ĉinaj prapatroj estis multe interesataj de la mistera kosmo. Ili teksis sen-nombrajn belajn mitojn. En la mitoj la herooj, kiel la dio de la ĉielo, rajdas sur nubo kaj nebulo, veturas per fajraj radoj aŭ siaj propraj flugiloj por postkuri venton, flugi al la suno kaj luno kaj veturi en la spaco. Tiuj revoj elvolvis la saĝon de la homoj de generacio al generacio. Ili pripensis diversajn rimedojn kaj kreis malsamajn instrumentojn por realigi sian revon.

Antaŭ 2 000 jaroj en ĉinaj libroj estis noto pri raketo, t.e. sago por estigi fajron uzatan en milito. Ĝi estis farita tre simple: Oni gluis grason, sulfuron aŭ aliajn facile bruligeblajn substancojn al stangeto de sago kun la celo ataki malamikojn per fajro. Tia fajra

sago lanĉita per pafarko estas diferenca de la moderna raketo, kiu lanĉiĝas per reakcia forto.

Antikvaj ĉinoj inventis alĥemion por ŝanĝi metalojn en eliksiron. Anstataŭ trovi eliksiron por senfine daŭrigi la vivon, ili trovis metodon fari pulvon. Ĝia forto estas multe pli granda ol tiu de graso kaj sulfuro en la atako, tial en la jaro 904 oni komencis uzi ĝin en milito.

Iom post iom oni rimarkis, ke dum sia brulado la pulvo estigas reakcion, kiu povas puŝi objektojn. Surbaze de tiu teorio oni faris fajraĵojn, kiuj povas flugi, kuri kaj rotacii. Tiaj fajraĵoj, kiuj povas ŝpruci diverskolorajn fajrerojn, ne nur estas amuzajoj de la popolanoj, sed ankaŭ ŝatataj de la kortego. Foje imperiestro de la Suda Song-dinastio Zhao Yun (Ĝaŭ Jun) (1225-1264 sur trono) faris bankedon por sia patrino. Por ŝin amuzi oni bruligis fajraĵon "tera muso". Post ekbrulo ĝi kuris senorde en la palaco kaj ruliĝis sub la tronon de la imperiestra patrino. Kaj ŝi paliĝis de teruro kaj foriris kun kolero...

Fakte, antaŭ tio, en la lastaj jaroj de la Norda Song-dinastio (960-1127) la "tondra obuso", inventita de la tiamaj teknikistoj,

jam estis pafita pere de la reakcio de la raketo. Tiu armilo kun fera ŝelo estis ekstreme forta en la eksplodo. Foje en batalo de la armeo de Song-dinastio kontraŭ nordaj invadantoj, la soldatoj de la armeo pafis "tondrajn obusojn", kiuj falis de la ĉielo en la akvon kaj ŝipojn. Ĝia eksplodo estigis incendion. Pro tio la malamikoj tute kolapsiĝis kaj forkuris panike.

Fiaskinte, la malamikoj reordigis siajn trupojn kaj direktis sian lancopinton al la armeo de Song-dinastio, sed ĉi-foje ili atakis surmare. La armeo de Song-dinastio, bone preparita, denove lanĉis raketojn, kies fajreroj plagiis la areon de centoj da kilometroj kaj cindrigis centojn da malamikaj ŝipoj.

Laŭ priskribo de la supre diritaj historiaj materialoj ĉinaj kaj alilandaj fakuloj opiniis, ke la armiloj "tondra obuso" kaj raketo kun antipuŝa ekipaĵo, uzitaj en la du bataloj, estas unuafoje enskribitaj en la historion kaj rigardataj kiel la plej fruaj raketoj en la mondo. Estas menciinde, ke tiujn batalojn propraokule vidis arabaj maristoj. Ili estis forte mirigitaj, ĉar en iliaj landoj oni neniam vidis tian armilon kaj oni batalis



daŭre per glavoj, lancoj kaj pafarkoj.

Dank' al invento de pulvo oni forlasis tradiciajn lanĉilojn — pafarkojn. Kvankam la tiamaj raketoj estis tre simplaj, tamen ilia forto estis alte taksata de la militaj strategiistoj. Poste iuj landoj ekhavis raketan trupon kaj raketajn fakulojn kaj sekve de tio multe riĉiĝis la formoj kaj specoj de raketoj. Aperis ne nur solŝtupaj, sed ankaŭ kunligitaj kaj plurŝtupaj raketoj, kiuj povis flugi tien kaj reen kaj esti uzataj ripetfoje. En la 14-a jc oni inventis novan raketon uzatan kaj tere kaj akve. Ĝi estas farita el 4 kunligitaj bambuaj tuboj, ĉiu 1.6 m longa. En la tuboj estis kaŝitaj pluraj malgrandaj raketoj. Kiam la 4 bambuaj tuboj estis bruligitaj, ili leviĝis supren de akvo. Kiam la tuboj forbrulis, la kaŝitaj malgrandaj raketoj elsaltis kaj

pafiĝis foren je pli ol unu kilometro. Tiamaniere oni multe pliigis la pafdistancon. Tia stafeta raketo tre similas al la nuna du-ŝtupa raketo en la teorio.

Ĉinaj raketoj ekpopulariĝis en la mondo en la 13-a jc. Tiam la mongolaj militistoj akiris ĉinajn pulvon, pulvofarejon kaj metiistojn en suden-ekspedicio kaj post nelonge ili enkondukis tiun teknikon en Hindion dum sia okcidenten-militiro. En 1248 anglo akiris ĉinan petardon. En 1377 ĉino Li Yuanying instruis teknikon pri raket-farado en Koreio. En 1399 en germana eldonaĵo vidiĝis bildo de ĉina raketo "Dia fajro kun fluga korvo". En 1621 aperis en Japanio ĉina plena verko de raketo-farado "Wu Bei Zhi"... Krom tio oni trovis ankaŭ, ke parolante pri pulvo kaj municio, la okcidentanoj ĉiam asociis ilin kun Ĉinio, ekz. ili nomis sal-

petron, materialon por fari pulvon, "ĉina neĝo", petardon "ĉina floro" kaj raketon "ĉina sago".

La ĉina tekniko pri raketo-farado fariĝis komuna riĉaĵo de la tuta homaro. Ĝi disvolviĝis plue en la Okcidento. Poste ĝi senĉese disvolviĝis de hinda raketo al Congreve-a raketo de Britio, de raketo papera al fera, de mallongdistanca al longdistanca... Dank' al apliko de alispecaj, pli avangardaj tekniko, oni faris raketojn pli kaj pli perfektaj. Oni uzas ilin ne nur en milito, sed ankaŭ en kosmonaŭtiko. Jen raketo suriris sian modernan vojon.

Nun raketoj estas diversaj, ĉiu kun sia propra funkcio, ekz. raketoj "Oriento", "Energio", "Ariane", "Titan" kaj "Changzheng". Nun oni flugigas ilin foren por esplori la misteron de la senlima kosmo. ■



Raketoj uzitaj en milito en 1232

## Anonco

Por ke niaj abonantoj en Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Ĉilio, Kanado, Kolombio, Meksikio, Nov-Zelando, Peruo kaj Usono akurate ricevu la revuon, ekde 1995 ni aere sendas la revuon. Tio rikoltis bonvenon. Tamen por tio ni pagas la afrankon preskaŭ duoble, kvankam pli ol 20 abonantoj aparte pagis por aera sendo. Pro financaj malfacilaĵoj ekde 1997 ni sendos la revuon al la abonantoj de la supre menciitaj landoj per ordinara poŝto. Ni aere sendos la revuon nur al tiuj, kiuj ekstre pagos 10,00 USD por aera sendo. Ni kore petas komprenemon.

**La Red.**

## Invito al Bariloche (Argentino)

La Barilochea Esperanto-Rondo invitas Esperanto-parolantojn kaj amikojn de la lingvo al ĝojiga kunveno en Bariloche (Argentino) de la 14-a ĝis la 21-a de decembro 1996.

En la mondfama turismejo vi povos ekskursi al belegaj vidindaĵoj, amuziĝi dum promenoj, ŝipveturoj, busaj ekskursoj kaj plezuraj vesperaj renkontiĝoj.

En la hoteletoj "Los Notros" [adreso: ŝoseo LLao-llao, Km 20, bushaltejo, tel. (0944) 48616] oni pagas 25,00 dolarojn tage inkluzive de maten- kaj vespermanĝoj.

En la gastejo "Patagonia Andina" [adreso: AR-8400 Bariloche, Morales 564, tel. (0944) 22783] oni tranoktas je 10,00 dolaroj kaj rajtas uzi la kuirejon por prepari la propran manĝon. En ambaŭ lokoj oni parolas Esperanton. Pli ol ducent aliaj hoteloj kaj kampadejoj disponeblas.

Ekskursoj, renkontiĝoj kaj aliaj plezuroj estas organizotaj laŭplaĉe. Do, ne manku al tia okazo: konsilindas anonci vian partoprenon en la menciitaj hoteletoj aŭ al: Barilochea Esperanto-Rondo, fakso (0944) 42154, Casilla correo (poŝtfako) 371, AR-8400 Bariloche aŭ Rolando 310, AR-8400 Bariloche.

Vin salutas kore  
**Barilochea Esperanto-Rondo**


## GALERIO


# Krono el oraj fadenoj

de YING ZI

Imperiestro Zhu Yijun (Ĝu Jiĝjun) de Ming-dinastio (1368-1644) mortis en 1620. Li estis enterigita en Dingling-maŭzoleo, Changping-gubernio, Pekino. En 1958 la Arkeologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj prifosis la maŭzoleon kaj trovis la kronon el oraj fadenoj, unu el la kunentombiĝitaĵoj. Ĝi estas la unua imperiestra krono ĝis nun trovita de ĉinaj arkeologoj.

La malpeza krono estas 24 cm alta, el delikata oraj fadenoj. Sur la krono estas du orfadenoj drakoj, flugantaj supren kaj simetrie alkroĉitaj al la du flankoj de la supro de la krono. Meze de la majestaj drakoj estas fajra globo. La metiartaĵo estas tre delikata kaj fajna. Ĝi estis tre rara ornamaĵo de Ming-dinastio.





Monto en nebuloso

Foto de **SONG GUOQING**

ISSN 0032-4361



9 770032 436009



世界语 《中国报道》 一九九六年第十一期

(本刊代号:二——九一五) 国内统一刊号:CN11-3397